

№ 174 - aŭtuno, vintro 2022
№ 175 - printempo, somero 2023

ISSN-1565 3315

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en ofdataj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Esperanto
116-a jaro · n-ro 1380 (6) | junio 2023

Harmonia (post)kongreso en
Israelo kaj Jordanio | 123

La Interlingvistikaj Studoj de AMU
25-jariĝas | 128

Kvar grandaj strategiaj temoj – niaj
defioj | 133

Vikipedian laboron subtenis
Erasmus+ | 138



Postkongresa ekskurso. Jordanio
(Kovrilo de la junia revuo "ESPERANTO")

REVUO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)

Ĉefredaktoro:
Mikaelo Lineckij
mikaelo@esperanto.org.il

Reviziantoj:
Gabi Zeevi (Israelo)
Amri Wandel (Israelo)
Andreo Peĉonkin (Rusio)

ELI-Prezidanto:
Jehoŝua Tilleman

Poŝta adreso de ELI: P.O.K. 21132, IL-6121101 Tel-Aviv, Israelo.



Karaj legantoj! Mi pardonpetas pro troa prokrasto de ĉi numero – la kaŭzo estas banala – la homa faktoro... Sed nun vi kompanse ricevas duoblan numeron, do vi ricevas duoblan porcion da informoj (bedaŭrinde ne ĉiuj estas jam aktualaj), interesaĵoj, literaturaĵoj, ŝercoj...

Eble iu volas prezenti sin – bonvenon, kaj ne tro modestu!

Enpaĝigo:
Mikaelo Lineckij, Gabi Zeevi

Retejo:
<http://esperanto.org.il/ie.html>

Abontarifo:
10 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

Reta abono: Eblas ricevi plenkoloran version de la revuo senditan al via elektronika poŝtadreso kaj tia abono kostos al vi nur 5 €! Via elektronika poŝtadreso atendatas. Kelkaj abonantoj jam uzas tiun servon.

Enhavo:

Denove pri la milito - <i>Krzysztof Śliwiński, M.Lineckij</i>	3
Grava pasintjara evento - BET-56 - <i>Gražina Opulskiene</i>	5
Personaj impresoj de BET, Kovno kaj Vilno - <i>A.Wandel</i>	8
Esperanto-Movado: Vintraj aventuroj - <i>A.Wandel</i>	9
La 7-a Luminesk' en Heilbronn - <i>Liba Gabalda</i>	12
Kien ni iru, kion ni faru? - <i>M.Lineckij</i>	14
Poemeca kuirado kaj manĝado - <i>Luiza Carol</i>	16
Diversaĵoj - <i>Traduko de M.Lineckij</i>	19
Esperanto en infanĝardeno - <i>G.Szubryczyńska</i>	20
La rusa kaj la rasismo - <i>traduko de Bardhil Selimi</i>	23
Esperiga informo de DUOLINGO - <i>traduko de M.Lineckij</i>	25
LITeraturaSUPlementO	26
Israela Esperantisto 175	31-56

KAJ DENOVE - UKRAINIO...

Mikaelo LINECKIJ

Ĉi-foje mi decidis doni eblon priskribi la militan situacion al unu el niaj legantoj - al pola esperantisto el urbo Lublino - s-ro Krzysztof Śliwiński (pro prokrasto de la apero, la informoj estas jam iom el la pasinto):

Invado de Rusio en Ukrainion:

2022: 19-a tago de la rusa agreso: apud Rivno estis detruita televida turo; pasinttage ukraina armeo detruis 3 rusajn helikopterojn kaj senpilotan aviadilon; Juristoj de Ukrainio komencis enketadon pri perfido de Galina Danilčenko, kiu post forkapto de la urbestro de Melitopolo iĝis lia anstataŭantino; el batal-



Sur la T-ĉemizo estas stilizita blazono de Ukrainio, kiu konsistas el nomoj de ukrainiaj urboj (en la ukraina): Kijivo, Ĉernihivo, Mariupolo, Harkivo,

terenoj oni sukcesis evakui 140 mil personojn; la graveda virino, vundita dum raketa pripafo de akuŝ-hospitalo en Mariupolo, mortis, ŝian infanon oni ne sukcesis savi; rezulte de aeratako al loĝkvartalo en Oĥtirka pereis ne malpli ol 3 personoj; rusoj dum evakuado pripafis civilulojn de Hostómeľ (Kijiva provinco) - unu persono pereis, du estis vunditaj.

Nokte rusa cenzuro blokis Instagram-on; Aŭstralio atribuis novajn sankciojn por 33 rusiaj oligarĥoj kun iliaj familioj; Kazaĥio sendis al Ukrainio unuan aviadilon kun humanitara helpo — oni planis transdoni pli ol 28 tunojn, ĉefe medikamentojn. Domokupado en Londo-no: ukrainoj okupis nmoveblaĵon de rusia oligarĥo kun la celo loĝigi ukrainajn militrifugintojn; laŭ Monda Organizaĵo pri Sano 18 milioj da ukrainoj iĝis viktimoj de la rusia invado - i.a. 6,7 milionoj iĝis internaj rifuĝintoj, 3 milionoj forlasis Ukrainion; ĝis nun en Rusio es-tis arestitaj preskaŭ 15 mil manifestaciantoj kontraŭ la milito (eĉ kun la puraj folioj); en Pollando 29 500 ukrainaj infanoj, fuĝintaj kun siaj patrinoj el Ukrainio, komencis lerni en polaj lernejoj kaj edukejoj; ku-racistoj el Israelo alvenis al Ukrainio kun movebla hospitalo; Hispanio provizore konfiskis en Barcelono jaĥton de rusa oligarĥo, estinta KŜS-oficiro (KŜS - en Sovetio - Komitato de Ŝtat-Sekureco), valoran 140 mln da dolaroj; Slovakio forpelis tri rusiajn diplomatojn; franca aktivulo faris „specialan operacon loĝejan”

kontraŭ posedaĵo de la filino de Putin en Biarritz — sur balkono de la aneksita domo oni fiksis flagon de Ukrainio kaj invitis ukrainajn rifuĝintojn; Francio: EU agnoskis la kvaran kompletan da sankcioj kontraŭ Moskvo; rusa ĵurnalistino Marina Ovsjannikova protestinta en ŝtata televido kontraŭ la milito, estis forveturita al policejo; ukraina armeo rebatis rusan provon transpreni kontrolon super sieĝata de semajno kaj duono Mariupolo — pro la rusa pripafo pereis pli ol 2 500 loĝantoj; laŭ Usono, preskaŭ ĉiuj rusaj ofensivoj estis haltigitaj.

2023: Pasinttage ukrainia aviado faris 10 atakojn kontraŭ rusaj grupiĝoj, raketaj kaj artileriaj taĉmentoj, pripafis 5 koncentriĝojn (i. a. 3 deponejojn kun municio kaj 4 staciojn de radioelektronika batalo), kaj rusoj en Donecka provinco pripafis 14 lokojn, damaĝis aŭ detruis 60 civilajn domojn, en tio 37 ekloĝitaj, lernejon, gasdukton, aŭtojn, aŭtobusojn kaj garaĝon; matene rusaj raketoj trafis al 9 loĝejoj kaj infanĝardenojn en la centro de Kramatorsk, unu persono mortis, 9 estis vunditaj, kaj estis pripafita infrastrukturo de Vovĉansk, pereis virino stirinta aŭton; soldatoj de Grupo “Wagner” en Baĥmut atingis lokon, kiun decembre vizitis prezidento de Ukrainio — Volodimir Zelenskij post renkontiĝo en la Ĝenerala Stabo anoncis daŭrigon de la defendo de Baĥmut.

Pasintjare japana helpo al Ukrainio egalas al ĉ. 1,6 mld da dolaroj; Litova Parlamento agnoskis Grupon “Wagner” terorisma organizaĵo; malpreciza rusa pafaĵo falis al loĝkvartalo en rusa urbo Belgorodo; Reuters: ĝenerala akuzistaro de Ukrainio postsekvas rusajn kaŝpafistojn pro grupa seksperforto al patrino kaj ŝia kvarjara filino; eksterlande en iu NATO-ŝtato Ukrainio komencis produktadon de municio, i.a. de la kalibro 135 mm; Novjorka Metropola Muzeo de Arto ŝanĝis priskribon de eksponaĵoj — i.a. du artistoj klasifikitaj kiel rusoj, nun estas ukrainoj.

NDLR Mi volas iom reveni, al IsEs-173. Se vi memoras, en ĝi estis publikigitaj deklaroj de kelkaj Internaciaj E-organizoj kontraŭ invado de Rusio en Ukrainion, inter kiuj estis ankaŭ deklaro de 5 famaj rusiaj geesperantistoj: Grigorij Arosev, Georgij Kokolija, Aleksandro Blinov, Irina Gonĉarova kaj Nikolao Gudskov. Al ĝi reagis nuna prezidento de REU, A. Lebedev, kiu skribis, ke tiu Deklaro estas privata afero de kelkaj homoj kaj, ke li plene subtenas la agreson:

“persone mi, kiel privata persono plene kaj senkondiĉe subtenas la specialan operacion de la rusia armeo, kiu okazas nun en Ukrai-nio, kaj la plej adekvata pozicio de REU kiel organizaĵo rilate al la temo – simple diri nenion pri ĝi”.

Fakte, tio estas pozicio de struto: la kapon en la sablon - solvo de la problemo. Mi skribis mian sintenon rilate al tio: *“mi markis lini-ojn, kiuj bone montras personecajn kvalitojn de tiu ulo (mi ne povas nomi lin “homo”, des pli “samideano”)*”. Al tiu mia frazo arde reagis tiama vicprezidanto kaj tiama Ĉefdelegito de UEA por Rusio (feliĉe jam eksa) S.Smentanina. Ŝi indigne skribis al mi: “Kiu permesis al vi tiumaniere skribi pri la prezidanto de REU???” En mia kapo tuj naskiĝis responda demando: **interese, de kiu mi devas peti permeson nomi aĉulon aĉulo?..**

GRAVA PASINTJARA EVENTO

Sukcesa BET-56 malgraŭ la milito kaj pandemio

Graĵina OPILSKIENE

La 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), okazintaj la 9-17an de julio en la litovia havenurbo Klajpedo, kunigis 263 esperantistojn el tridek landoj, du el Israelo. Ĉirkaŭ 230 el ili efektive alvenis kaj ĝuis semajnon en la Klajpeda Universitato kaj en la urbo. La milito en Ukrainio kaj la pandemio malhelpis ĉeeston de pliaj aliĝintoj, sed la programo restis varia kaj abunda.

Scienca programo

La solena inaŭguro okazis en la urba koncerta salono. Prof. Amri Wandel bonvenigis aŭskultantojn al prelegoj de Scienca Universitata Sesio-38 de Akademio Internacia de Sciencoj. Li informis ankaŭ pri tio, ke ĉiuj prelegotekstoj estas eldonitaj en la IKU-libro 2022, aĉetebla en la libroservo de BET. La matenaj programeroj invitis al la prelegserio de prof. Duncan Charters pri kulturo, al la prelegciklo de prof. Ilona Koutny pri esperantologio kaj Amri Wandel pri Spacteleskopoj. Josef Reinwart informis pri ŝanco de esperantistoj ekoni novajn sanigajn produktojn, Alfred Heiligenbrunner rakontis pri imuna sistemo, Manfred Westermayer prezentis du prelegojn “Renasanco de marĉoj” pri nova instruada projekto kaj “30 oraj horoj”, raportis Brunetto Cassini.



Ryszard Rokicki prelegis pri “Alternativa priskribo de Esperanta vortfarado”. Carlo Nicola Colacino parolis pri “Gravitaj Ondoj”. En la Somera Universitato pri la litovaj lingvo, kulturo, historio profesoron Aloyzas Gudavičius sukcese anstataŭis Aida Čižikaitė.

E-kursoj kaj aliaj programeroj

Okazis diversnivela Esperanto kurso, gvidata de ŝatataj instruistoj Nina Pietuchowska, Mikaelo Lineckij, Dalia Pileckienė, Aida Čižikaitė. Ankaŭ la posttagmezoj plenis je eblecoj: Grażyna Szubryczyńska dividis siajn spertojn en prelegoj “Esperanto en infanĝardeno” kaj “Ekologio en infanĝardeno”, Tuomo Grundström rakontis pri la verkistinoj Hella Maria Wuolijoki kaj Aino Julia Maria Kallas, Margarita Želve gvidis nin tra “Kvar granddamoj de Latvia Esperanto-poezio”. Al Afriko ĉeestantojn invitis Gediminas Degėsis, kiu bone konas la kontinenton, provante

ŝanĝi niajn stereotipojn kaj antaŭjuĝojn pri tiu parto de la mondo. Spertojn de germanaj esperantistoj en daŭripova agado konigis Ulrich Brandenburg, diskutojn pri la agado de UEA kaj ĉefe pri ties reago al la milito en Ukrainio elvokis la programero “UEA hodiaŭ”. Ankaŭ la seminario pri aktivula maturigo (AMO) kun la temo “Baltio en Eŭropa Kunteksto” gvidata de Stefan MacGill kaj la ateliero pri tradukado gvidata de István Ertl allogis plurajn partoprenantojn de BET.



Grupo de Nina Pietuhovska

Libroservo kaj kuriero

Dum la tuta semajno funkciis libroservo modele prizorgata de Irena Jagminaitė. Eblis elekti inter la plej novaj eldonoj kiuj aperis speciale por BET kaj inter pli frue eldonitaj libroj kaj revuoj. La ok numeroj de la lukse eldonitaj BET-gazeto “Lumturo” estis ofte videblaj en la manoj de esperantistoj –

kaj pro la utilo havi la programon ĉemane, kaj pro la interesa enhavo, abundaj fotoj kaj kurtaj raportoj. La redaktoro Choe Taesok kaj la kongresa fotisto Gražvydas Jurgelevičius multe laboris, por ke “Lumturoj” estu informriĉaj kaj interesaj por la legantoj. Ĉiujn numerojn eblas legi en la retejo de LEA <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>. Ĉiu partoprenanto ricevis la esperantlingvan informilon “Malkovru Klajpedon” kaj la Libron por BET-ano.

Vesperaj programoj

La vesperaj kulturaj programoj bele kompletigis la instruan, sciencan kaj klerigan programon de BET. Koncertoj de Saša Pilipović kaj Georgo Hanzlik, Anjo Amika, muzikgrupo “Sepa kaj Asorti” arigis esperantistojn en la granda aŭlo de la 7-a Universitato. Ĉar Mikaelon Bronštejn por kantado anstataŭis Sergio Strašnenko, la aŭtoro de la kantoj legis por ni siajn versojn per Zoom. Post la oficiala programo



ĉiuvespere grupeto da kantemuloj restis kune, kaj inspiritaj de Mikaelo Lineckij, Natalia Ivanova kaj Sergio Strašnenko, kantis diverslingvajn kantojn kun gitara akompanado.



Junulara programo kaj ekskursoj

En BET-56 estis grupeto de gejunuloj kiuj ofte organizis sin por ekskurseti aŭ ludi, por ĝui koncertojn en la urbo aŭ simple promeni. La kerno de la junulara grupo formiĝis jam printempe en Italio dum IJK, sed ankaŭ aliaj gejunuloj rapide interamikiĝis. Proksimeco de la maro logis multajn, sed la vetero, kvankam suna, estis freŝeta almenaŭ por gastoj de sudaj landoj. Neniu BET okazas sen ekskursoj, kaj la sperta organizanto Antanas Visockas zorgis, ke esperantistoj ekkonu la regionon.

Krom perpieda ekskurso tra Klajpedo partoprenantoj vizitis la Kurŝan Terlangon, apudlagunan regionon, kaj eĉ japanan ĝardenon kreitan en Litovio. Merkrede multaj esperantistoj memstare ekskursis gvidataj de litovaj samideanoj.

BET-56 finiĝis per kutimaj ĝisrevidoj, dancado de Laima Vilkelytė, bela kanto de la 15-jara Gabija Okeana Gričiutė kaj nekutima fina koncerto. Kortuŝaj kaj sencoplenaj kantoj de niaj ukrainiaj amikoj, speciala etoso kiu regis en la salono kaj dum la tuta BET ne lasis dubojn, ke esperantistoj kondamnas la militon kaj kore esperas, ke Ukrainio sukcesos defendi sian kaj nian sendependecojn. La 18-an de julio ni disiris al niaj hejmoj, kelkaj eksterlandanoj ankoraŭ ekskursis tra Litovio, sed en niaj planoj por la venonta somero jam estas BET-57 en Latvio, kiu espereble okazos en la belega urbo Ventspils. Ni esperas, ke ĝis tiam la mondo iĝos sana kaj paca...

Personaj impresoj de Amri Wandel pri BET kaj poste pri Kovno kaj Vilno

Tio estis mia dua BET (post la 55-a BET en Panevėžys en 2019). Tiam, kiel ankaŭ ĉi foje, ĝi provizis idealan kadron por la Scienca Universitata Sesio (SUS) de AIS. Tiam, kiel ankaŭ ĉi foje mi trovis ĝin ege agrabla, kun amika etoso, riĉega kleriga kaj artaj programoj, kaj multaj ekskursaj eblecoj, ofte kun juda historio. Dum en Panevėžys granda grupo vizitis la judan komunumon kaj havis kortuŝan renkontiĝon kun la rabeno, en Klajpeda mi vizitis la lokan sinagogon, kaj post BET mi faris tritagan vojaĝon tra la plej gravaj judaj monumentoj, sinagogoj kaj muzeoj en Kovno kaj Vilno, helpe de lokaj esperantistoj. En Kovno mi vizitis la solan aktivan sinagogon kaj renkontiĝis kun ĝia prizorganto, Moshe Beirak, kiu persone konis s-ro Povilas Jegorovas, mia longtempa amiko kaj la BET-ĉeforganizanto. Estis kortuŝa vizito en la muzeo de Chiune Sugihara, la japana diplomato kiu en la dua mondmilito savis milojn da judoj donante al ili vizojn malgraŭ la malpermeso de siaj superuloj (fotoj: <https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10228247528763319>). En Litovio mi vizitis la Gaon judan muzeon kaj la apudan artan muzeon de Samuel Bank – holokaŭston travivinta pentristo, kaj la judan Geto-n.

EL KOLEKTO DE JUDAJ ŜERCOJ

- Abramĉjo, al mi ŝajnas, ke via edzino ne fidelas al ni...

**NOVJARAJ RENKONTIĜOJ:
IF, IS, NR, JES kaj Luminesk'**
(*El Revuo Esperanto, Februaro 2023*)

Amri WANDEL

Unuafoje post la pandemio denove okazas fizike la jarfinaj (aŭ silvestraj) renkontiĝoj en Germanio. La 19-a Novjara Renkontiĝo (NR) okazis en la urbo Wiesbaden apud Frankfurto kun 175 partoprenantoj, kaj la 7-a Luminesk' – en Heilbronn, kun ĉ. 50.

Historia fono

Partopreninte ambaŭ kunvenojn kiel ankaŭ plurfoje en la lastaj jaroj, kaj la plimulton de la mitologiaj Internaciaj Festivaloj (IF)), mi ŝatus prezenti mallongan historian fonon kaj komenti pri la diferenco inter la du. En 1979 la Internacia Seminario (IS) de Germana Esperanto-Junularo dividiĝis en du – la IS kaj IF. La dua fariĝis ŝatata evento por la pli aĝa grupo kaj okazis 31 fojojn inter 1979 kaj 2015, kutime kun 150-200 partoprenantoj (<https://mallonge.net/vd>) sub la organizado de Hans Dieter Platz (HDP). En 2002 aperis nova jarfina kunveno – la Novjara Renkontiĝo - NR, kiu de tiam okazis 19 fojojn, kutime kun 150-200 partoprenantoj, sub la organizado de Lu Wunsch-Rolshoven kaj Betti Maul (<https://mallonge.net/vf>). Dum NR fariĝis pli familia kunveno, kiun partoprenas ankaŭ multaj infanoj, IF plu allogis ĉefe la veteranajn geamikojn. Kiam ĉesis okazi la IF, ĝian rolon transprenis nova evento – Luminesk', kiu okazas ekde 2015, kutime kun ĉ. 50 partoprenantoj (<https://mallonge.net/vg>), organizita de Andreas Diemel. Paralele plu okazas la jarfina evento por gejunuloj, Junulara Esperanto-Semajno, alterne en Germanio kaj Pollando (JES, <https://mallonge.net/vh>), kiu daŭrigas la antaŭan Internacian Seminarion organizitan inter 1957 kaj 2009 de Germana Esperanto-Junularo (<https://mallonge.net/vi>). Foje oni demandas, ĉu vere necesas en la sama lando du novjaraj eventoj por plenkreskuloj? La respondo evidente donis la publiko, kiu fervore kaj ripete revenas ĉiun jaron al sia ŝatata jarfina kunveno. Kvankam esence en la formato ili similas (unusemajna evento kutime en junulargastejo, silvestra balo, ekskursoj, taga programo, vespere distra programo), estas diferencoj en la stilo kaj la celaĝo. Plue, montriĝis ke estas malfacile trovi unu gastejon por pli ol ĉ. 200 personoj.

Persone mi povas aserti ke ili havas sufiĉe diferencon etoson kaj ĉiu el la du estas agrabla kaj ĝuinda en sia specifa maniero.

Internacia Vintra Universitato, Jomo kaj Tajdo

En 2007 mi proponis al HDP organizi kadre de la IF scienc-klerigan aranĝon similan al la Internacia Kongresa Universitato (kiu ĝis 1980 nomiĝis Internacia Somera Universitato). Li entuziasme konsentis, kaj tiel naskiĝis la Internacia Vintra Universitato (IVU, <https://mallonge.net/vj>), kiu de tiam okazis ĉiujare (krom dum la pandemiaj du jaroj), tiel ke ĉi-foje estis ĝia 14-a sesio. Post la ĉeso de la IF, IVU okazis foje en Luminesk', foje en NR, kaj foje en ambaŭ paralele. En la ĉi-jara sesio okazis dum NR ok IVU-prelegoj, ĉiuj havis la indikon "IVU" en la programbroŝuro. En miaj du prelegoj (Spacteleskopoj – de Hubble ĝis James Webb kaj Artemis – la homaro revenas al la Luno) okazis ekzamenoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kies partoprenintoj (17 kaj 18 respektive) ricevis virtualajn AIS-39 atestojn. La ceteraj IVU-prelegoj dum NR temis pri kalkulado per romiaj ciferoj (Kalus Rumrich), du prelegoj pri Faraonaj tomboj (Pedro Hernandez), Klimato-ŝanĝo (Paula Weil), Kultura politiko por Esperanto en la interreta erao (Ruben Fernandez) kaj La estonta lingvo kaj kulturo (István Ertl kaj Liina Vahtrik).

En Luminesk' okazis kvin IVU-prelegoj, en du okazis AIS-ekzamenoj ("Luno, Suno kaj tajdo" de Christof Roether kaj "Ĉielaj gastoj – metoroj, kometoj kaj asteroidoj" de Amri Wandel), kun 8 kaj 14 ekzamenitoj respektive. Ĉiuj ricevis paperajn AIS-atestojn en publika ceremonio, kiu simbole okazis antaŭ la vespera prezentado de la kanto "Tajdo" komune verkita en la ateliero de Jomo laŭ la temo de la prelego, kvazaŭ amkanto inter Tero kaj Luno, kun sciencaj faktoj pri la tajdo kaj la malproksimiĝo de la Luno for de la Tero dum milionoj da jaroj, prezentitaj en la prelego (<https://mallonge.net/vo>).

Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden – vortoj kaj bildoj.

Jam la trian fojon la NR okazas en tiu ĉarma urbo proksime al Frankfurt, en la moderna kaj komforta junulargastejo, kaj ankaŭ venontjare ĝi estas planata samloke. La 27.12-an okazis interkona vespero, kiu iom similis al la Movada Foiro dum UK, sed anstataŭ movadumi oni gustumis naciajn specialaĵojn: trinkaĵojn kaj frandaĵojn.

Sekvis interkonaj ludoj organizitaj de la gejunuloj. La programo por la sekvaj tagoj troviĝis en la reto, kie oni povis facile sekvi la ŝanĝojn. Por la pli konservativaj partoprenantoj ekzistis ankaŭ papera programotabulo. En la dua tago multaj partoprenis la urban viziton de



Wiesbaden, lerte ĉiĉeronatan de Ulrich Mathias. Ege helpis lia prepara prelego, kiu ebligis pli kompletan anticipan informiĝon pri la vidindaĵoj – inter ili la plej granda kukolhorloĝo de la mondo kaj la publika varma fonto. Survoje reen ni vidis la monumenton por marki la judan sinagogon, kiu estis detruita de la nazioj en la Kristalnokto en 1938, ĉirkaŭita de la nomoj de miloj da lokaj judoj murditaj en la Holokaŭsto. La kleriga programo enhavis multajn prelegojn, inter ili informadon pri la KER-ekzamenoj de Katalin Kováts, pri la 23-a Israela Kongreso, la sperton de EspeRadio, la revizion de PIV kun Bertilo Wennergren, lingvajn ludojn kun István Ertl, pri Vitro kaj vitro-arto, georfoj en Kongolando kaj Esperanto en Afriko kaj projekto reta lernejo. Paralele okazis diversaj manlaboroj kiel kreado el argilo, origamio, feltumado kaj trikado, kaj movigaj programeroj, kiel gimnastikado, Zumba, Ĉigongo, ĵonglado, movigaj ludoj, cirklodancado kaj masaĝate- liero. Estis ankaŭ debatoj pri la grandaj potencoj kaj la mondpolitiko, gvidataj (virtuale) de Jesper Jacobsen, kurso pri spirita vivo kun Bernhard Westerhof, kiu ankaŭ gvidis la ekskurson al la eŭropa bahaa templo en Hofheim-Langenheim.

Kompreneble estis ankaŭ kurso kaj programeroj por komencantoj, kaj okazis turniroj pri ŝakludo kaj tabloteniso. Inter la vesperaj programoj elstaris la premiero de la cirka pupteatra prezentaĵo de Ch.Frank, kiu ravis etulojn samkiel plenkreskulojn, kaj la koncerto de Jomo. Krome estis la kutimaj Internacia Vespero kaj Silvestra Bufedo kaj Balo. Estis ankaŭ pianokoncerto pri klasikaj infanaj komponaĵoj far Ludger Schmeink kaj la TEJO-muzikalo “June kaj Kune”.

La plej bonan resumon prezentas multaj fotoj kaj videoj, kiuj bele transdonas la viglan etoson kaj programon de la NR, videblas en la publika deponejo: <https://mallonge.net/vl>. Ankaŭ Luminesk' disponigas deponejon por fotoj de la partoprenantoj, kiuj videblas en: <https://mallonge.net/vm>

La 7-a Luminesk' en Heilbronn 27.12.2022-03.01.2023

Liba GABALDA

Dank' al la laboro kaj la entuziasmo de Andreas Diemel, helpata de GEA, estas okazo renkontiĝi jarfine ĉe Luminesk'. Paralela Esperantorenkontiĝo nomiĝas NoRo. Finfine post longa paŭzo pro la pandemio de la koronaviruso la aranĝo povis okazi en la universitata urbo Heilbronn, kiu situas en la norda parto de la federacia lando Baden-Württemberg ĉe la rivero Neckar. La vinkultivado tie havas longan tradici-



on. Temas precipe pri ruĝaj specioj de vinberoj. La aranĝon partoprenis kvindek da geesperantistoj el dek landoj. Dum la unua vespero Barbara Brandenburg prezentis vingustumadon de kvin malsamaj vinoj. La

sekvan tagon dum la antaŭtagmezo ni povis ĉeesti du prelegojn. La unua temis pri "La arkta zono hodiaŭ – aspektoj, ekonomio kaj politiko", kiun lerte kun akompanaj bildoj prezentis Ulrich Brandenburg. La dua prelego temis pri "La komunejo – bild-datenbanko de la vikipedioj", prezentata de Renardo Fössmeier. Kristin Tytgat gvidis Esperantokonversacion por interesatoj. Posttagmeze Christof Roether interese prelegis pri "Luno, Suno kaj tajdo – kiel ili interrilatas". Poste okazis ateliero de JoMo pri kantoverkado. Pro la influo de la ĵus finita prelego pri kosma fenomeno estis facile elekti temon: "Tajdo". JoMo unue prezentis la skemon, donis regulojn kiel verki tekston kaj samtempe komponi muzikon. Li uzis sian malgrandan "vojaĝgitaron" kaj laŭ naskiĝmonatoj de la ĉeestantoj li tuj havis la notojn, kiujn li transformis al muziko. Vespere ni per bildoj spektis Badenio-Vurtembergan prezenton fare de Edmilson Lima Serejo.

En gufujo oni povis refreŝiĝi per biero aŭ teo. Tie Debora McCarney rakontis al ni pri la pitoreska urbeto Vitoria Gasteiz, situanta en la eŭska parto de Hispanio. Belaj bildoj akompanis ŝian prelegon. Vespere gesinoroj Brandenburg prezentis Torinon, la venontan UK-urbon, al kiu ili allogis nin per aperitivo Martini, kafo kaj ĉokolado. Do, tio estis bona instigo por iri al Italio. Mi alportis kvin albumojn pri IF, tiel la partoprenantoj povis revidi sin plijunaĝaj. Vendrede okazis la tuttaga ekskurso al proksimaj lokoj de Heilbronn. Necesis uzi nur buson kaj trajnon. En Neckarsulm la partoprenantoj vizitis la “Biciklan Muzeon” kun multe da eksponaĵoj. Poste oni daŭrigis al la historia centro de la urbo Bad Wimpfen. Tre ĉarma urbeto kun multaj trabfakaj domoj, inter kiuj elstaris unu bele surpentrita. Poste, en la gufujo, kiun prizorgas gesinoroj Kleemann, Andreo Grossmann rakontis ŝercojn. Sabate Dieter Rooke parolis pri la historio de SAT, kaj Franz Kruse klarigis “Kiel GEA perrete organizas kongresojn”. Post la tagmanĝo Amri Wandel prezentis tute novan prelegon “Ĉielaj gastoj: meteoroj, kometoj kaj asteroidoj”. Ĉe la fino kelkaj plenigis demandaron por poste ricevi atestilon pri sukceso. Denove daŭris la ateliero de JoMo pri kantoverkado. Sekvis silvestra vespera bufedo kaj koncerto de JoMo, kiu dancigis la ĉeestantojn. Li ĉiam scias krei admirinde belan etoson. Poste la balo povis komenciĝi per polonezo. Je la 11-a horo vespere venis novjara bonvenigo el Israelo kaj Latvio. Jam antaŭ la noktomezo aŭdiĝis unuaj antaŭsignoj de la baldaŭa novjara alveno ĉe ni. Per bondeziroj, ĉirkaŭbrakado kaj kisado ni bonvenigis la Novan Jaron-2023 kaj poste denove dancis. Dimanĉe antaŭtagmeze ni povis spekti bildprezenton pri la insulo Reunio, Madagaskaro, Sudafriko fare de Jöel Fontaine kaj Laure Wolff. Poste Amri Wandel prezentis filmon pri Tanzanio, kie devus en la jaro 2024-a okazi la UK. Post la tagmanĝo ni profitis belan sunan posttagmezon por promeni. Iuj ŝatis fari paperfaldadon, kiun instruis Gisela Schröder. Post la reveno la kantoverkado estis sukcese finita kaj vespere prezentita al la cetera publiko. Samtempe okazis disdonado de atestoj al la sukcesintoj de la ĉi-foja IVU-sesio aranĝita de Amri. La antaŭlastan tagon Edivaldo Simao de Freitas prezentis la lokan brazilan movadon en Fortalezo. Pli precize li parolis pri sia vivo kaj esperantistiĝo. Poste Jaŝo prezentis La Decamerone de Giovanni Boccaccio. La posttagmeza ekskurso gvidis la partoprenantojn al la kastelruinoj Weibertreu kaj al la malgranda urbo Weinsberg. La vesper-on okupis la subtitolita filmo “La poŝtisto”. Dum la adiaŭa vespero estis okazo por ĉiuj, kiuj volis, improvize sin prezenti. Per tio la semajna aranĝo finiĝis. Korajn dankojn al la organizantoj de tiu ĉi agrabla evento, kie oni sentas sin en familia etoso kaj ĝuas la lastajn tagojn de la jaro.

KIEN NI IRU, KION NI FARU?

Mikaelo LINECKIJ

“Eĉ guto malgranda konstante frapante...”, “Ni, paŝo post paŝo”... testamentis por ni nia “lumturulo” - inicianto de La Lingvo Internacia kies naskiĝtadon esperantistoj de la tuta mondo celebras ĉiujare la 15-an de decembro.

Gvidantoj de E-Centro en malgranda germana urbo Herzberg am Harz Esperanto - urbo (tio estas oficiala(!) nomo de la urbeto) okaze de aŭtuna infan-tago organizita de multaj asocioj, kluboj, en la urbo-centro okazigis poresperantan informadon. Sukcesa tago en agrabla vetero. Kunagantoj: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy - gvidantoj kaj “motoroj” de la Centro, libroj, faldfolioj kaj diversaj inform- kaj instrumaterialoj.

Bedaŭrinde, dum mia preskaŭ 6-jara loĝado en Israelo mi ne vidis, nek aŭdis pri io simila. Pri kiu progreso en la loka E-movadeto povas temi, se pri la ekstera publika informado okupiĝas neniu? Ja en tiu agado povus aktive



partopreni multaj simplaj membroj de ELI, kiuj nun estas nur pasivaj ĉeestantoj en nemultenombraj aranĝoj. Tio ja estas unu el gravaj manieroj por aktivigi niajn homojn. El mia propra, pli ol 54-jara sperto pri aktivado en E-Movado: fondo kaj gvido de 2 E-kluboj en ĉefurbo de Ukrainio, Prezidanto de UkrEA en 2009-2010. Mi ĉiam metis antaŭ mi prioritatan celon - fari tiel, por ke funkciado de la klubo estu varia, interesa kaj alloga por ĉiuj membroj. Kaj tio donis la rezultojn - inter 86 E-kluboj de Sovetio, nia, relative nova klubo, estis inter 5 la plej fortaj! Ni uzis multajn agaddirektojn por aktivigi la membrojn: grave - partopreno en informaj agoj, en kiuj la homoj sentis sin kiel ambasadoroj de la Tutmonda Movado! Ni uzis praktike ĉiujn amasajn urbajn aranĝojn: Tagojn de Kijivo (la lastajn sabat-dimanĉon maje),

Tagon de Lingvoj kaj aliajn, aŭ eĉ esperantajn: Naskiĝtago de Esperanto (26-an de julio), Internacian Ago-tagon kaj certe ĉiujare aranĝis ion okaze de la Zamenhof-tago. Tio estis eksterkluba aranĝo - laŭ la interkonsento kun iu organizaĵo ni faris informadon pri Zamenhof, pri Esperanto kiel la lingvo kaj kiel la fenomeno. Por ne fari ĉi-



Anoj de la klubo en "Ago-tago" (la 1-a sabato de oktobro) sur ĉefa placo de Kijivo.



*Fragmento de la spektaklo "Kio estas Esperanto?".
Dekstre sidas Dio - M.Lineckij*

teman prelegon, ni kune verkis spektaklon "Kio estas Esperanto?" (certe en la rusa - en la 80-90-aj jaroj tio estis normala), en kiu "partoprenis": Dio, Arkianĝelo, Diablo, Esperantisto-informanto kaj iom da popolo, kiu dum la spektaklo fariĝis esperantistoj, laŭte diskutante regulojn de la gramatiko. La spektaklo estis multfoje demonstrita ankaŭ en diversaj renkontiĝoj de sovetiaj esperantistoj kiel ekzemplo, kiel eblas interese informadi pri Esperanto. Pri tiu temo eblas skribi ankoraŭ multon, sed la spaco premas... Eble iom pli poste... Bedaŭrinde en Esperanto-Movado de Israelo ĉefan rolon havas formalismo - gravas ion fari/aranĝi, sed kvalito de la ago havas sekundaran rolon... Escepto estas, verŝajne, nur dum- kaj postkongresaj ekskursoj, gvidataj de Amri Wandel, kiuj plaĉas praktike por ĉiuj partoprenantoj...

POEMECA KUIRADO KAJ MANĜADO

Luiza CAROL

Miaj unuaj paŝoj sur la vojo de poemeca kuirado kaj manĝado okazis en la tempo kiam mi ŝanĝis miajn dietajn kutimojn kaj fariĝis vegetarana. Mi estis 35 jaraĝa en 1982, kiam tiu vivoŝanĝo okazis. Ĝis tiam, kuirado estis tediga devo por mi. En la somero de tiu jaro, mi volis provi portempan ŝanĝon de miaj dietaj kutimoj, esperante ke kelkaj semajnoj de speciala vegetarana dieto rekomendota de sperta dietisto povus plibonigi mian sanstaton. Tiel, mi elektis unu el la malmultaj vegetaranaj dietistoj, kiuj ĝuste tiutempe komencis malfermi la unuajn kabinetojn en la lando. Mi ne povis scii tiam, ke li famiĝos kaj estos konsiderata grava pioniro de la scienca dieto vegetarana.



Mia unua kaj sola vizito al Dr. Ben-Uri fariĝis mejloŝtono en mia vivo. Je mia surprizo, liaj unuaj demandoj ne rilatis al mia sano, sed al mia ĝenerala vivostilo kaj al mia ĝenerala pensmaniero. Kiam mi menciis mian poeziemon, li diris ke li jam estas certa ke mi realigos dramecan plibonigon de mia sano kaj transiros al vegetarana dieto por la resto de mia vivo. Mi atentigis lin, ke mia persistemo ne estas sufiĉe forta por realigi tiom drastan kaj definitivan ŝanĝon de kutimoj. Li diris: “Por tio vi ne bezonas persistemon, sed poemecan imagopovon.”

Dr. Ben-Uri mem estis poeto en la pola. Li ŝatis jogajn meditadon kaj fizikajn ekzercojn, tial li rekomendis al mi libron pri joga dieto. Tiu kuracisto ne nur donis al mi bonajn konsilojn pri manĝado, kiuj ege helpis min plibonigi mian sanon, sed ankaŭ instruis min pri tio, kiel ĝui kuiradon kaj manĝadon, pere de meditado, pri la mistera sankta energio kiu igas la akvon flui kaj la plantojn kreski, pri la beleco de fruktarbejoj kaj grenokampoj... Mallonge, li igis min konscii pri la spiritaj kaj poemecaj aspektoj de vegetara kuirado kaj vegetara manĝado. Post mia vizito al Dr. Ben-Uri, okazis al mi tre interesa fenomeno. Mi komencis rememori profundan psikan traŭmaton en mia frua infaneco, kiun ĝis tiam mi preferis entombigi en la plej profundajn tavolojn de mia memoro. Terura ŝoko okazis al mi ĉirkaŭ la aĝo de 3 aŭ 4 jaroj, kiam mi ekkonsciis ke parto el mia manĝaĵo fontis el la murdo de mildaj kaj amindaj bestoj.

Tio estis des pli korskuiga, ĉar mia tuta imagpovo estis turniĝanta tiutempe ĉirkaŭ la ĉarmaj antropomorfaj bestoj kiuj abundis en la bildoj de porinfanaj libroj kaj eĉ ĉirkaŭis min kiel pluŝbestoj. Mia familio trapasis terure malfacilan tempon klopodante konvinki min daŭrigi la viandmanĝadon post tiu ŝoko. Ili sukcesis tion, nur certigante al mi, ke ne ekzistas alia elekto por homoj. Dum multaj tagoj mi ploris antaŭ ĉiu manĝo, ĝis mi kutimiĝis al cirkonstanco kiun mi kredis neevitebla. Ĉirkaŭ 30 jarojn poste, la konversacio kun tiu dietisto konvinkis min, ke ja ekzistas ankaŭ alia ebleco por manĝi, kaj ne nur por limigita tempo kiel mi estis supozinta, sed por la tuta vivo. Mi komencis permesi al tiuj nebulaj rememoroj pri infaneco reveni el mia subkonscio. Subite mi sentis min kiel knabino, kies kara revo efektiviĝis. Tiu ĉi sento venis kune kun granda emocio, kaj ĉar emocio naskas poemumadon, ĝi do venis kune kun eksplodo de entuziasmo por poemlegado kaj poemverkado.

Indas klarigi ĉi tie, ke la antropomorfa perspektivo rilate al bestoj (t.e. la atribuo de homa psikologio al bestoj) estas tute natura por infano, sed malrealisma kaj malĝusta el scienca vidpunkto. Aliflanke, nei ajnan similecon inter la psikologioj de la bestoj kaj tiu de la homoj estas same nerealistika kaj nescienca sinteno. Mi persone elektis mezan vojon, kiu taŭgas por mia natura kompatato kaj simpatio al la bienaj bestoj kaj por mia respekto por ties sentoj, eĉ se ili ne tutece identas kun homaj sentoj. Mi elektis poemecan sintenon, kiu permesas al mi identiĝi metafore kun tiuj vivaspetoj kiujn homoj ja kundividis kun aliaj specioj loĝantaj sur la sama planedo. Sekve de tio, kiam mi pensas pri bienaj bestoj, mi fokusiĝas sur tiujn aspektojn kiujn mi ŝatas aliformi en poemajn metaforojn: doloro, plezuro, timo, kuraĝo, amo, fido, dankemo, fideleco, patrina amo, bezono de libereco, bezono esprimi siajn sentojn iel... La ĉi lasta aspekto aparte fascinas min kiam temas pri fiŝoj. Iliaj voĉoj estas neaŭdeblaj por homaj oreloj, kaj tial multaj homoj forgesas ke fiŝoj ja estas vivantaj estaĵoj, kiuj krias korŝire pro doloro kaj timo, sed faras tion pere de altfrekvencaj sonoj kiujn ni povas povas tro facile ignori... Ĉu ekzistas ajna poeto en la tuta mondo, kiu neniam sentis frustriĝon kiam lia aŭ ŝia poeto voĉo maltrafis la korojn de indiferenta publiko?... Vivi sen kulpi pri eĉ la plej eta perforto al alia vivanta estaĵo (koncepto nomita "a himso" en la antikvaj aziaj tradicioj) estas verŝajne nerealegebla idealo, konsiderante la fakton ke eĉ mikroboj, bakterioj kaj damaĝemaj insektoj estas vivantaj estaĵoj.

Tamen, rilate miajn sentojn pri bienaj bestoj, mi tutkore kundividas tiujn de Bernard Shaw, kiu diris: “La bestoj estas miaj amikoj kaj mi ne manĝas amikojn.”

Multaj homoj sentas ke estas malfacile ŝanĝi siajn kutimojn pri manĝado, eĉ kiam ili estas certaj ke tio utilis al ilia sano. Ili kutime realigas tian ŝanĝon nur iom post iom, revenas al malnovaj kutimoj kelkfoje, provas anstataŭigi tradiciajn viandmanĝaĵojn per “vegetaranaj kolbasoj”, “vegetaranaj hamburgeroj”, “vegetarana kokinsupo” k.t.p. Tiaj nomoj de manĝaĵoj celas mildigi la nostalgion de la homoj kiuj ĉesas manĝi viandon. Mi ne bezonis tian strategion, ĉar la ĝojo pri la realigo de mia delonge forgesita revo estis tiom emociiga, ke ĝi malebligis ajnan bedaŭron. Ekde kiam mi ŝanĝis miajn dietajn kutimojn, ĉiu manĝo asociiĝas kun poemoj kaj kantoj en mia menso. Ĉu mi meditas pri poemo kiun mi legis aŭ ĉu mi kreas mian proprajn versojn, miaj kuirado kaj manĝado fariĝas novaj spiritaj aventuroj ĉiutage. Tamen, mi ne komplete rompis la familiajn kuirtradiciojn. Ekzemple, unu el miaj plej oftaj manĝaĵoj estas “mamaliga”, iu speco de maiza kaĉo vere populara en Rumanio, mia naskiĝlando. Alia rumana manĝaĵo kiun mi ĝuas estas “sarmale de post” (rizobuloj volvitaj en brasikfoliojn). Kaj la listo estas sufiĉe longa por ke mi ne suferu pro manko de kontinueco en mia ĉiutaga vivo. Ankaŭ la maniero laŭ kiu oni prezentas la manĝaĵon sur la tablo povas inspiri rememorojn pri konataj poemoj aŭ instigi iun krei poemojn. Esplorante per interreto, mi malkovris ke multaj belegaj floroj povas dekoracii niajn tablojn ne nur en florvazo, sed ankaŭ kiel bongustaj kaj belaj ingrediencoj de niaj salatoj kaj aliaj manĝaĵoj. Fakte, en kelkaj restoracioj mi vidis glaciaĵojn kaj fruktosalatojn ornamitajn per rozaj petaloj. Foje mi preparis belan kaj bongustan salaton mik-sante flavajn petalojn de kukurbetaj floroj kun folioj de ruĝa brasiko kaj verda cepo. Mi planas eksperimentojn ankaŭ kun aliaj manĝeblaj floroj. Kutime mi ne havas paciencon uzi receptojn, sed uzas mian imagpovon por eksperimenti ĉiutage novajn kuirejajn kreaĵojn. Mi fiaskas ofte. Sed kiam okazas al mi krei bongustan vegetaranan manĝaĵon, mi konsideras ĝin veran poemecan realigon.

La fakto ke mia poemeca dieto influas tre pozitive mian sanon kuraĝigas personojn ĉirkaŭantajn min pliigi la procenton de plantoj en siaj dietoj. Miaj nepo kaj filino fariĝis vegetaranoj, ĉi-lastaj iĝas eĉ vegana la-statemp, kaj mi provas sekvi ŝian ekzemplon.

Mi esperas ke la evoluo de la teknologio finfine anstataŭos la buĉejojn per grandaj laboratorioj por malmultekosta “kultivita viando” (t.e. viando produktita per kultivado de bestaj ĉeloj, anstataŭ ol bestbuĉado). Tia vizio ne plu estas malproksima, ĉar kultivita viando jam ekzistas, sed ĝia produktado ankoraŭ ne estas sufiĉe malmultekosta. Tamen, oni supozas ke ĝi fariĝos pli kaj pli facile havebla por ĉiuj. Mi esperas, ke tia grava ŝanĝo havos grandajn ekologiajn avantaĝojn, plibonigos la sanon de la homaro, neniiĝos la malsaton en multaj malriĉaj regionoj kaj ĉesigos multajn formojn de krueleco kontraŭ bestoj. Koncerne la poemecan aspekton de la kuirado, mi supozas ke homoj preferus pensi ke la fonto de sia viando estas bela moderna laboratorio, ol buĉejo... En tiaj cirkonstancoj, la etika aspekto de la homa dieto malaperus, kaj ajna elekto dependus nur de la kuracistaj rekomendoj kaj de la individuaj gustoj.

DIVERSAĴOJ

GRAVA VIVREGULO!

Se al vi io ne plaĉas - ŝanĝu, sed se vi nenion ŝanĝas - penu ne plendi!

INTERESA VIDPUNKTO

Ĉe enirpordo de Stellenbossa Universitato (Sudafrika Respubliko) pendas jena teksto:

“Por ekstermi ajnan popolon ne bezonatas atombomboj aŭ potencaj raketoj. Por tio bezonatas nur malaltigi nivelon de kleriga kvalito kaj permeso por studentoj trompi dum la ekzameno.

Malsanuloj mortas pro laboro de tiaj kuracistoj. Domoj ruiniĝas pro konstruado far tiaj inĝenieroj. Mono malaperas el manoj de tiaj ekonomiistoj kaj librotenistoj. Justeco ne funkcias pro laboro de tiaj juristoj kaj juĝistoj.

Ekstermo de klerigo kaŭzas ekstermon de popolo!”

Laŭ la sociaj observoj: orelojn havas nur tiuj, kiuj havas cerbon.

Tiuj, kiuj ne havas cerbon, havas nur buŝon...

Sinjoro Sankta Petro, mi petas pardonon pro la malfruiĝo, sed mi - ne venos...

ESPERANTO EN INFANĜARDENO

Grażyna SZUBRYCZYŃSKA

Mi finis kurson de Esperanto en la jaro 1990 – baldaŭ post eklaboro en infanĝardeno en urbo Torun' (Pollando). Komence temo „Esperanto” aperadis tie hazarde, spontane, ofte dum miaj rakontoj, ekzemple pri feriadoj. Mi kune kun infanoj kelkfoje rigardis filmeton "Mazzi" - sen iuj ajn komentoj. Poste, ili dum libera tempo mem diris: „*Mi estas bela*” kaj „*Mi estas forta*”, desegnis la principon kaj la ĝardeniston. Por la pli aĝaj lernantoj kelkfoje mi faris lecionetojn laŭ Ĉe-metodo. Sed se temas pri la lingvo mem - mi longe instruis ne multe pli ol "saluton", „bonvolu” kaj „dankon”. Mi supozis, ke miaj lernantoj rapide enkapigus la vortojn, sed ankoraŭ pli rapide la scio lasus iliajn kapojn. Pro tio mi elektis aliajn vojojn por semi la grajnon, kiu eble iam puŝos ilin por veni al esperantista mondo.



Mi sukcesis gastigi en nia infanĝardeno esperantistojn el Hispanio, Latvio, Brazilo, Ĉinio, afrikaj landoj. Ili en Esperanto rakontis pri propra kulturo kaj ekkonis polajn dancojn kaj kantojn fare de miaj lernantoj. Januare 2004 mi ricevis proponon kunlabori helpe de Esperanto kun ĉina infanĝardeno Tian Mi. Komence ni interŝanĝis



salutojn, spertojn, fotojn, desegnaĵojn ktp. Post iom da tempo ĉina direktorino Ĉen Dongmei proponis, ke ni estu ĝemelaj edukejoj. La oficiala subskribo de la interkonsento pri la ĝemeliĝo de niaj infanĝardenoj okazis la 1-an de aŭgusto en Zaozhuang, kie gastis mi kun mia direktorino. La aranĝo estis organizita tre solene kun ĉeesto de la loka urbestro, aliaj eminentuloj de la urbo kaj ĉ. 300-persona publiko. Krome dum tuta semajno ni havis ŝancon ĉeesti la lecionojn, manĝi kun infanoj, dormigi kaj eĉ instrui ilin. Ĉio nur per Esperanto. Poste miaj lernantoj partoprenis en desegno-konkurso „Tiumaniere mi vidas Don Kiĥoton” kiun organizis Hispana Esperanto-Federacio okaze de la kvara centjariĝo de la unua eldono de la verko de Cervantes. La desegnaĵoj kun la komentoj

aperis en madrida kulturdomo, kaj post iom da tempo en hispan-esperanta libro „Don Kiĥoto parolas en Esperanto” (ĉiu mia lernanto posedas ĝis nun la libron kun la dank-diplomo).

Mi mem organizis similan konkurson: kadre de la 125-jariĝo de la unua libro de Esperanto kaj la 20-datreveno de nia infanĝardeno samtempe. Temo „Civitanoj de la mondo” ŝajnis esti iom malfacila, sed ni ricevis 73 desegnaĵojn de 70 infanoj el 6 landoj. La ekspozicio aperis okaze de nia solena jubileo en porinfana toruna teatro. Kun Sebastiao el Sao Paulo ni faris interkulturan ŝanĝon inter niaj lernejoj: infanoj en ambaŭ edukejoj desegnis pri historio de propra loĝloko kaj hejme kun gepatroj en la nacia lingvo skribis leteron al elektita kolego. Ni ĉion skankopiis, tradukis en Esperanton kaj poste de Esperanto al la propra. Tiumaniere ĉiu infano ricevis trilingvan leteron kaj desegnon de alia lando. Kun 6-jaruloj mi uzas libron de P.P.Grzybowski „Renkontoj kun diferenculoj. Rakontoj por interkultura edukado” (ĝi aperis en Esperanto, pola kaj multaj aliaj lingvoj): Avo-Esperantisto klarigas al Kamila, ke ne ĉiuj homoj egalas, sed same meritas por ilin estimi. Temas i.a. pri diversaj kulturoj, religioj, vivstiloj kaj kapabloj. Post diskuto kun infanoj pri la apartaj rakontetoj mi daŭrigas la temojn.

Interese: mi instruis „Hava nagila”-n antaŭ atako en kopenhaga sinagogo. Des pli, februare de 2015 miaj lernantoj suferis kun „niaj judoj”. Post terorismaj atakoj fare de „Islama Lando” la infanoj kontraŭis forte opiniojn de ĉirkaŭaĵo: „*Ĝenerale araboj ne povas esti malbonaj. Homoj, kiuj kreis tiun mallogan dancon de ventro, ne povas esti malbonaj*”. En 2018 jaro okaze de 100-jara datreveno de liberiĝo de Pollando, mi sendis pere de interreto invitojn al desegnaĵ-konkurso “Pollando miaokule”. La tasko por infanoj, en du aĝkategorioj (ĝis la 7-a kaj ĝis 10-a jaro), estis esprimi propran imagon de la temo per libera pentraĵ-tekniko kaj unufraza komento en sia nacia lingvo.



Mi proponis ke la lokaj esperantistoj traduku la frazon al Esperanto por ke mi povu traduki en la polan. Venis 170 laboroj el 6 landoj. La komisiono, elektante tri la plej bonajn laboraĵojn, rimarkis, ke almenaŭ 50 ceteraj meritas por montri ilin al vasta publiko. Post multaj streboj mi sukcesis organizi ekspozicion en la toruna Pedagogia Biblioteko kaj honoran protekton de la toruna urbestro. En la ekspoziciejo estis prezentitaj 52 desegnaĵoj kun komento en 3 supremenciitaj lingvoj. La infan-kreaĵojn akompanis informoj pri Esperanto kaj kolekto de esperantlingvaj turismaj informiloj pri vizitindaj lokoj en Pollando. La 2-an de aŭgusto 2019 okazis la solena malfermo de la ekspozicio. Venis homoj el medio de la toruna edukado kaj kulturo, krome “hazardaj” personoj, ĉar la aranĝo estis bone reklamita por torunanoj per la urbaj kulturinformiloj kaj interreto. Ĝojigis nin la partopreno de kvar koreaj geesperantistoj kaj, inter ili, ĉeesto de Jungkee Lee, estrarano de UEA kaj, kio estis speciale kortuŝa, avo de la partoprenanto en la konkurso. Pro la ĉeesto de la gastoj ĉiuj programeroj estis tradukitaj al Esperanto. La aranĝon filmis kaj intervjuis nin la loka televido. Post granda sukceso de la ekspozicio la direktorino de la lernejo petis, ke mi faru metodan novigon en mia grupo. Do – mi simple diris al la “miaj” 4-jaruloj, ke mi posedas ankaŭ Esperanton kaj de tempo al tempo miksas ĝin kun la pola. Neniu ekmiris, la infanoj ofte imitis min kaj eĉ postulis novajn vortojn kaj esprimojn. Ni komencis preskaŭ ĉiun tagon per kanto “Saluton”, kalkulis, amuziĝis; la lernantoj petis, ke mi traduku parton de la kanto por la gepatroj por prezenti tion en iu festo. Bedaŭrinde la pandemio ne permesis organizi multon, sed Esperanto en nia grupo vivis. Mi esperas, ke en koroj de miaj lernantoj la ideo de Esperanto restos por ĉiam. Ankaŭ iliaj parencoj multe aŭdas pri ĝi. La lingvo estas por ili alloga kaj utila. Krome videblas, ke Esperanto estas kreiva lingvo kaj nepre estu uzita ankaŭ por bone eduki homojn, krei valorajn personecojn.

Certe, Esperanto vere havas fortan edukan valoron!

LA RUSA KAJ LA RASISMO

Ĉu estas vere, ke la lingvo kaj kulturo rusa estas grandaj?

Tomasz Kamusella,

Universitato de Sankta Andreo, Skotlando

(Tradukis Bardhyl Selimi, Albanio, la 7-an de junio 2022)

Post la rusia atako kontraŭ Ukrainio, komence de 2022, la nova termino, la rasismo, estas uzata por la negativa referaĵo al la ideologio de neo-imperiismo, kiun la Kremlo starigas por pravigi kaj promocii siajn agojn.

Sed en la Okcidento oni tre malmultan atenton dediĉis al la rolo de rusa lingvo en ĉi tiu ideologio. En la landoj anglo-parolantaj la registaroj lasas la lingvon je la uzo de civitanoj laŭ ties deziro. La lingva politiko ne traktas la lingvon kiel objektivon en si mem aŭ kiel instrumenton por antaŭenigi iun apartan politikon.

Kontraŭe, tio estas normo, eĉ fundamento de la politiko en la Centra kaj Orienta Eŭropo, kie la nacio, laŭ linio de etno-lingvistika nacismo, difiniĝas kiel tuta parolantaro de unu certa lingvo (aŭ lingva komunumo).

Ne dediĉante atenton al tiu evidenta aspekto de la rasismo, kaj kiel la lingvo kaj kulturo rusa instruitas kaj esploratas en la universitatoj de anglalingva medio, donas al Kremlo levitan manon en ties media batalo en la tuta mondo, akompananta la brutalan kaj ne pravigitan militon en Ukrainio. Nekompreno tia estas taktika nebuleco, kio fakte privilegias Rusion en ties stilo irredentista de la konstruado de la imperio por “arigi ĉiujn landojn rusparalontajn” ene de la landlimoj de Rusio.

Kaj denove, ukrainoj kaj aliaj nacioj najbaraj al Rusio devas pagi prezon pro ĉi tiu eraro de la Okcidento, helpanta senvole la Kremlon aktualigi sian revon pri Granda Rusio...

Averto

La 24-an de februaro, kiam helpe de Belorusio la rusa armeo ekokupis Ukrainion, (1) la Okcidento vekigis definitive pro tiu drasta ŝanĝiĝo en Eŭropo post-Helsinko.



La bonaj malnovaj principoj establitaj en la jaro 1975 inter la Sove-tia Bloko kaj Demokratia Mondo en la kunveno en la finlanda ĉe-furbo estis vanaj. Ne plu validas la netuŝado de la ŝtataj landlimoj en Eŭropo. La Eŭropa Unio kaj NATO respektas la principon de egal-eco inter la membroŝtatoj, sendepende de la nombro de la loĝantaro kaj grandeco de la teritorioj, aŭ forto de armeoj kaj ekonomioj. En Eŭropo la grandaj kaj malgrandaj ŝtatoj estas egalaj.

Tamen, Rusio de Putin neniam aplikos ĉi tiun regulon, kion la Kremlo rigardas kiel ĝena limigo, des pli ke Moskvo kaj Pekino opinias ke “malforta lando devas obei al forta lando”, tial Ukrainio devas obei al Rusio, kaj Tajvano al la Popola Ĉinio.

La sorto de Eŭropo kaj la demokratio estas decidata nun en Ukrainio: se la estonto estos je liberecoj kaj demokratieco, aŭ la rasismo venkos. La rasismo - preter la slogano “socialismo je ĉina stilo” de Pekino, “ideologio de Juche de Nordkoreio”, “suverena demokratio” de Moskvo, “illiberala demokratio” de Hungario, aŭ “bona ŝanĝiĝo” de Pollando (1), ĉiuj estas novaj nomoj por la aŭtoritarismo. En la tempo de la milito kaj interna kverelado por la ŝtatpotenco, kiel oni tion rimarkas nun en Rusio, ĉi tiu sistemo verŝajne akiros la plenan formon de la totalitarismo. Rezulte, la rasismo evidentiĝas ke estas aliĝanta al la vicoj de la musolina faŝismo, hitlera naziismo kaj moskva stalinismo.

Ne mirinde, ĉi tiu mondo-misgvidado trikita de “Rusio” kaj “faŝismo” estas fariĝantaj, aktuale, kun la aneksiĝo fare de Rusio en 2014 de ukraina Krimeo. Tiutempe, ĝi modeliĝis el la pli frua neologismo, naciismo, referinte al la politikaj praktikoj de la Krem-la pro-registara partio “La unuiĝinta Rusio”, ebliginta kaj promociinta “la suverenan demokration” aŭ la diktaturon de Putin dum du jar-dekoj, ankoraŭ daŭranta...

La logiko de la termino naciismo reflektas la dupolusan malhelan opozicion, kie Putin apogas sian politikon internan kaj eskteran. Ni estas kontraŭ tiuj, “la tradiciaj valoroj de la Kristana Rusio” kontraŭ “Degenerita Okcidento”, de aŭtokracio kontraŭ demokratio.

NDLR. Atenton! Vi ĵus tralegis komencon de la artikolo... Se vin interesas la restita, tre granda parto (11 paĝoj A4), bonvolu skribi al mi (mikaelo@esperanto.org.il), kaj mi sendos la plenan tekston

REAGINDA INFORMO

Mikaelo LINECKIJ

Laŭ statistikaj kalkuloj nun en DUOLINGO ĉirkaŭ 300 000 (!) homoj lernas Esperanton!!!

Malgraŭ ke kvanto da studentoj estas sama kiel tiu de la klingona, tamen mi opinias, ke la kvanto estas atentinda...

Karaj legantoj, konsideru, ke Esperanton sintezis Eliezer-Lazaro Zamenhof kun la ĉefa ideo - faciligi internacian komunikadon! Do, ni pensu pri tio, ke **de ĉiu esperantisto en la mondo dependas pruvado pri viveco de Esperanto!** Kaj por ni estas tre grava tasko - necesas provizi tiujn novulojn per la kontaktoj!

INFORMO POR LA PRIPENSADO!

Mi opinias, ke estraro de ELI devus pripensi lanĉon de io simila al "Koresponda Servo" kaj instigi ELI-anojn al la korespondado! La plej aktivajn leterumantojn eblas plu stimuli, ekzemple malavare premii ilin per iu valorajo - eble per libro, da kiuj, laŭ mia supozo, ELI havas pli ol sufiĉan kvanton - kial ili simple kuŝu senmove kaj sen la utiligo? Do, ELI-estraro bone pensu!

Kaj jen estas reala korespondpeto - mi petas vin rilati al ĝi serioze!

Saluton karaj!

Mi estas ĝoja amikiĝpete kontakti vin.


Mi estas Joel Muhire kaj loĝas en Rutshuru, DR Kongo.

Mi ellernis Esperanton en 2008 kaj zorgas pri klubo Rondo Esperantista de Kiwanja. Mi kantas ankaŭ en Esperanto. Iom neĝisdate, pri mi vi legos en www.senopone.wordpress.com.

Mi naskiĝis en 1989. Mi havas edzinon kaj 1 filon Francisko.

Mi ĝojos legi de vi.

Amike via Joel Muhire. <joelmuhire0@gmail.com>





NENIAM DISKUTU KUN AZENOJ!

Azeno diris al Tigro:

- Herbo estas blua.

La Tigro respondis:

- Ne, la herbo estas verda.

Ekis disputo, kaj ili iris al la Leono – la arbara reĝo, kiu kutime solvas diversajn malakordojn.

Ankoraŭ ne atinginte la lokon, kie la Leono sidis sur sia trono, la

Azeno jam komencis krii:

- Via moŝto, ĉu estas vero, ke herbo estas blua?

La Leono respondis:

- Jes, vere la herbo estas blua.

La Azeno ekĝojis kaj daŭrigis:

- La Tigro kun mi ne konsentas, diskutas, incitas min. Bonvolu puni lin.

- La Tigro estu punita je 5 jarojn da silento.

La Azeno ĝoje saltetis kaj foriris, kontente ripetante:

- La herbo estas blua, jes, la herbo estas blua...

La Tigro, konsentinte pri la puno, demandas la Leonon:

- Via reĝa moŝto, pro kio vi punis min? Ja la herbo estas verda, ĉu ne?

La Leono respondis:

- Jes, vere, la herbo estas verda.

La mirigita Tigro demandas:

- Pro kio do vi punis min?

La Leono respondis:

- Tio havas neniun rilaton al tio, ĉu la herbo estas verda aŭ blua. La punon vi ricevis pro tio, ke tia kuraĝa kaj saĝa besto kiel Tigro, ne devas elspezi sian tempon por diskuto kontraŭ Azeno. Kaj, krome - viziti min kun tiu temo. Plej malutila elspezo de tempo estas diskuti kontraŭ stultulo kaj fanatikulo, kiun principe interesas nek vero, nek real-eco, sed nur venko de propraj konvinkoj kaj iluzioj. Neniam elspezu la

tempon por sensencaj disputoj. Ja estas tiaj homoj al kiuj kiom ajn da pruvoj kaj faktoj oni donu, ili tute ne kapablas tion kompreni. Sola afero, kiun ili volas – ĉiam esti pravaj, malgraŭ, ke tio estas ege disputinda.

Kiam laikeco krias, intelekto devas silenti...

EN ĈIU ŜERCO ESTAS ERO DE ŜERCO...

Mi atente legas reeĥojn de (hura)patriotismaj rusaj homoj pri ĉi tiu milito. Krom konstante ripetigantaj flanke de oficiala rusia propagando argumentoj, krio el animo de iu rusia virino min frapis:

”Slavoj, rusoj kaj ukrainoj, vi murdas unu la alian pro tiu judo Zelenskij!”.

Nu jen, finfine! Mi delonge atendis, kiam ektemos pri judoj: Jesuon Kriston ili krucumis, infektis Eŭropon per pesto, en macaon ili aldonas sangon de kristanaj suĉinfanoj, sovetajn gvidantojn ili venenigadis kaj jen – tia milito kaj ĉu ili povas esti flanke???

Tio ja ne povas esti, ĉar tio povas esti neniam!!!

Certe, tio, plej verŝajne, ne estas oficiala vidpunkto de Rusio, tio estas simple krio el animo de iu tre antisemitema virino, kiu (povas esti) strebas al paco...

Gloron al defendantoj Ukrainion!

Vladimir Dimarskij (ekskijvano), Usono, tradukita de M.Lineckij

PRIPENSU ...

- Ĉu vi scias kial malbono multas en la mondo?
- Kial?
- Ĉar malbono estas bone financata.
- Hmmm... Kaj la bono?
- Ve, la bono – ne... La bono estas subtenata nur de honesteco de homoj, de justeco kaj vero.
- Hmmm...
- Sed ĉu scias vi, kial fine la bono venkas?
- Kial?
- La mono iam finiĝos, sed honesto, justeco kaj vero – ili eternas...

Aristarĥ Romaŝin, tradukis M.Lineckij

UKRAINA ŜERCO

... ĉu mi ĝuste komprenis, ke Ukrainio atakas Rusion en Ukrainio, tial Rusio iniciatis en Ukrainio militan staton (sed en Rusio ne estas milito, ne-ne-ne), por defendi Ukrainion de Ukrainio en Ukrainio, kiu estas ne Ukrainio, sed Rusio?

Ilia Krasilŝĉik, tradukis M.Lineckij

EL VIVO DE CHURCHILL

Foje Churchill prepariĝis por parolado per radio antaŭ la popolo. Li mendis taksion, venis al la domo kaj demandas la taksiiston, ĉu povos tiu atendi lin dum duonhoru, por veturi reen? La taksiisto ne ekkonis Churchill-n, kaj diris, ke ne povas atendi, ĉar hodiaŭ per radio parolos Churchill kaj li rapidas hejmen por aŭskulti la paroladon. Tio tre plaĉis al Churchill kaj li pagis pro la veturo signife pli multe ol estis interkonsentite. La taksiisto komence rigardis al tiu granda mono, poste al Churchill, kaj diris:

- Ha, iru tiu Churchill al diablo, prefere mi atendu vin...

- Estimata sinjoro ŝuis-to, diru al mi, kiel fakulo, ĉu ankoraŭ eblas ripari tiujn ŝuojn?
- Kara Jaĉjo, se vin vere interesas mia opinio, al mi ŝajnas, ke jam venis tempo ilin vendi ...



Instruistino diras al la gelernantoj:

- Infanoj, ni krii al la ĉielo "Dio ne ekzistas!"

Ŝi rimarkas, ke unu juda knabo staras silente kaj ne krias.

Ŝi demandas:

- Kial vi ne krias?

Li respondas:

- Se tie estas neniu, kiucele ni krii? Kaj se tie tamen iu estas, kiucele malbonigi la eventualajn interrilatojn?

Konklude: saĝeco aperas de infanaĝo...

Avinjo instruas la nepinon:

- Memorfiksu, karulinjo, ke bela, riĉa, sen malbonaj kutimoj, havanta bonan humursenton kaj malavara estas kvin diversaj viroj...

VIVOSPERTO

Geedza paro da judaj pensiuloj veturis per la aŭto. Post 11 horoj da veturado ili estis jam tro lacaj por plua veturado kaj ili decidis lui la ĉambbron en la proksima hotelo. Ili planis ripozi kvar horojn kaj poste veturi plu. Antaŭ la forlaso de la hotelo la administranto donis al ili la fakturon por 350 \$. La viro indigniĝis kaj postulis la klarigon pri tiu granda sumo. La administranto respondis, ke la hotelo estas tre prestiĝa.



- Bone, estu ĝi tre bona hotelo, sed ne tiom, por pagi 350 \$ kontraŭ 4 horoj de la restado – kontraŭdiris la viro. La administranto asertis, ke 350\$ estas la baza kosto. Tamen la viro postulis renkontiĝi kun la manaĝero. La manaĝero, aŭskultinte lin, klarigis, ke en la hotelo estas olimpikdimensia baseno kaj grandega konferenc-salono, kiu estis plene je ilia dispono.

- Sed ni ja ne uzis ilin! – diris la edzo.

- Sed ili ja estas kaj vi povis ili uzi – klarigis la manaĝero

Krome li rakontis, ke la geedzoj povis aŭskulti koncerton, pro kiu estas fama la hotelo.

- La plej bonaj artistoj el Nov-Jorko. Holivudo, Las Vegas koncertas ĉi tie, - daŭrigis la manaĝero.

- Sed ni ja ne vizitis eĉ unu el tiuj koncertoj!

- Sed ili ja okazas ĉi tie kaj vi povus veni, - respondis la manaĝero.

La manaĝero insistis, kaj fine la edzo kapitulacis kaj konsentis pagi. Sed pro tio, ke ili ne kunhavis la fakturlibreton, li petis la edzinon fari tion.

Ŝi plenigis la fakturon kaj donis ĝin al la manaĝero. La manaĝero miris:

- Sed, ho sinjorino, ĉi tie estas nur 50 \$!

- Jes, ĝuste. Mi minusis 300 \$ pro tio, ke vi noktumis kun mi, - respondis ŝi.

- Sed mi ja ne noktumis kun vi! – indigne emfazis li.

- Des pli malbone por vi. Mi estis ĉi tie 4 horojn kaj vi certe havis tiun eblon...

La konkludo: Estas danĝere kontraŭstari pensiulojn –
ja ili havas grandegan vivosperon!



DEKKVAR LUPOJ

En la naturo ĉio estas tre intime interligita...

Kiam en la jaro 1995 dekkvar lupoj estis liberigitaj en la naturon en usona Flavŝtona Nacia Parko (*Yellowstone National Park*), la sciencistoj eĉ ne suspektis, ke tiu ago funde ŝanĝos tutan ekologian sistemon de la parko.

En la parko lupoj forestis dum 70 jaroj kaj tutan tiun tempon tie regis cervoj, kiuj dum senkontrola reproduktado (penado de homoj kontroli ilian kvanton estis praktike senrezulta) damaĝis al la loka flaŭro. Certe tiuj 14 lupoj ne povis formanĝi ĉiujn cervojn, sed ili devigis tiujn pli atente elekti paŝtejojn kaj eviti iujn partojn de la parko. Sur tiuj lokoj komenciĝis reviviĝo de la kreskaĵoj.

Dum ses jaroj kvanto da la arboj grandiĝis kvinoble. Aperis kastoroj, kiuj bezonis arbojn por konstrui la digojn kaj dometojn. Sekve de tio aperis ondatroj, anasoj kaj fiŝoj. La lupoj malgrandigis populacion de ŝakaloj, kio kaŭzis grandiĝon de kvantoj de leporoj kaj musoj kaj tiuj allogis al la parko akcipitrojn, mustelojn kaj vulpojn. En la parko aperis ursoj, kiuj povis peli lupojn de ties manĝrestaĵoj por la finmanĝo. En la parko grandiĝis kvanto da beroj.

Sed, kio estas la plej mirinda, la lupoj ŝanĝis ankaŭ la riverfluojn. La riverkuŝejoj rektiĝis kaj stabiliĝis, malpliigis erozio de la bordoj. Tiel okazis pro tio, ke influo de lupoj rilate al la cervoj kaŭzis eksplodecan kreskon de arboj kaj herboj laŭborde de la riveroj, kio donis ilian plifortiĝon. Ŝanĝiĝis eĉ geografio de la parko dank' al tiuj 14 lupoj alveturigitaj tien antaŭ preskaŭ 30 jaroj.

BONVENON AL LA DUA PARTO

N-ro 175 printempo, somero 2023

ISSN-1565 3315

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

Enhavo:

Ho, Israela Kongreso - <i>Gražina Opulskienė</i>	32
Harmonia (post)kongreso - <i>Amri Wandel</i>	37
Kurte sed sincere - <i>Eŭgeno Koutonjuk</i>	40
Esperanto savis ŝin - <i>traduko de Yehuda Miklaf</i>	43
Reeĥo el Litovio - <i>Abromas Laimundas</i>	44
Ni Funebros - <i>Jehoŝua Tilleman</i>	45
Koĉjo - <i>traduko de Mikaelo Lineckij</i>	47
Kio estas politiko? - <i>traduko de M.Lineckij</i>	48
LITeraturaSUPlementO, Ŝercoj - <i>tradukis Abromas Laimundas</i> ..	49
Familio - <i>tradukis M.Lineckij</i>	50
Pri Mona Lisa - <i>tradukis M.Lineckij</i>	51
Kial hundoj vivas malpli ol homoj? - <i>tradukis M.Lineckij</i>	52
Reguloj por optimistoj - <i>tradukis M.Lineckij</i>	53
Hmmm, noktaj timoj - <i>tradukis M.Lineckij</i>	54
Distraĵoj por la cerbo - <i>tradukis M.Lineckij</i>	55
Foto-Mozaiko de la Kongreso	56

Ho, Israela Kongreso...

Graĵina OPULSKIENÉ (*El Revuo Esperanto, Junio 2023*)

Kiam ni planas partopreni kiun ajn esperantan eventon, certe ni havas kelkajn kriteriojn: kie, kiam, kiu organizas, kia programo, kiuj aliĝos, kiaj ekskursoj, kiu prezo, k.t.p. La 23-a Israela Kongreso invitis nin al la malnova urbo Tiberiado, kiu situas ĉe la fama lago de Galileo. Evidentiĝis, ke nia hotelo Panorama estis tuj apud la lago kiun la lokanoj nomas Galilea Maro kaj kiu estas vere belega! Eĉ se la kongresa hotelo ne



estis la plej luksa, ĝi plene taŭgis por kongresi: salono por prelegoj kaj kulturaj programeroj, ebleco matene krei la matenmanĝon laŭ inspiro kaj produktoj provizitaj en la kuirejo, apudaj lokoj por vespermanĝoj, kaj kun samĉambranoj estis vere proksima kontakto pro la grandeco de ĉambroj. Mi bonŝancis loĝi kun juna, ĉarma kaj tre laborema loka knabino, Inbar Mor. Mi aŭdis, ke judoj ĝenerale estas tre lernemaj, sed Inbar tamen surprizis min: ŝi praktikis Esperanton notante ĉiun novan vorton, kaj aldone lernis la hispanan lingvon, dancojn kaj aliajn aferojn dum ĉiu libera minuto!

La kongreso okazis la 13-15 de aprilo, postkongreso la 16-21an, sed ĉio estis tiom plena kaj varia, ke ŝajnis al ni, ke estas multe pli longa kunestado. Amri Wandel kaj kelkaj helpantoj estas jam ege spertaj organizantoj de tiaj kongresoj, kaj tion ni sentis dum la kongreso kaj speciale dum la postkongreso. Ĉiam trankvila, bonhumora, fleksebla, rapide adaptiĝanta al deziroj kaj ebloj de la partoprenantoj, sperta pri etaj trukoj kiel ŝpari monon, Amri vere estis por ni ne nur gvidanto kun verda Esperanta flago, sed ankaŭ modelo de ĉiĉeronado!

La kongreson ĉeestis pli ol tridek homoj, de kiuj 13 estis de eksterlando. Por mi persone estis tre agrable revidi lokajn jam konatajn esperantistojn Amri kaj Gila Wandel, Mikaelon Lineckij, ekkoni Nava Bilicki, paroleti kun Angela Belenko, aŭdi la modelan Esperanton kaj interesajn faktojn de Jehoŝua Tilleman. Bele gajigis la kongreson kaj junigis kvinopo de familio Yuval. La kongreson ĉeestis ankaŭ Ŝulamit Cemah-Tandler kiu estas komencanta esperantistino, kaj surprizis nin per donacoj: multaj el ni ricevis de ŝi donace lernolibron

pri hebrea lingvo, kaj fine de la postkongreso Ŝulamit enmanigis al ni tasojn kun foto de ĉiu partoprenanto!

Eksterlandaj esperantistoj reprezentis plurajn landojn: Germanion, Ukrainion, Svedion, Hispanion, Rusion kaj Litovion, sed ni povus menciigi ankaŭ Brazilon pro Ana Ribeiro, kiu same kiel la litovino Rasa Mišeikytė nun loĝas en Germanio. Mi ĝojis, ke krom Rasa kaj mi en kongreso kaj postkongreso estis ankaŭ Laima Vilkelytė, kaj mi iom fieras, ke ni estis triopo kiu ne krokodilis, eĉ se ni solaj loĝis en la ĉambro. Cetere, la lingva nivelo de la kongresanoj estis alta, kaj dum la postkongreso eĉ tre alta. Mi ege ŝatis la iom ne kutiman por kongresoj formaton: ni ekskursis de mateno, kaj postagmeze kaj vespere estis la prelegoj kaj kultura programo. Se vin interesas, kio okazis, kontroli en <https://www.esperanto.org.il/ik23>. La programo estis tiom abunda, ke ofte la prelegantoj devis pli kurte prezenti siajn prelegojn. Jam dum multaj israelaj kongresoj per la unua violono ludas Mikaelo Bronŝtejn, kaj ĉijare li, feliĉe, povis partopreni fizike. Mikaelo gvidis nin poezie kaj literature kaj tra siaj literaturaj spertoj kaj tra juddevenaj poetoj en la rusa kulturo, kaj, kompreneble, koncertis. Amri Wandel, atentokapte informis nin pri la serĉado de ekstertera vivo, Heide Martha Otto prezentis la ekeston kaj agadon de Bahaa E-ligo, kiu jam atingis la 50-an jubileon. Okazis ankaŭ la kortuŝa memorhorro pri la elstara esperantisto Jefim Zajdman kun multaj fotoj prizorgitaj kaj montritaj de lia vidvino Anĝela. Kantojn kaj rememorojn pri soveti-ukrainia aktivulo Zajdman prezentis Mikaelo Lineckij kun helpo de Mikaelo Bronŝtejn, Natalia Bertse kaj Tetiana Kolomic. Specialan intereson kaj multajn demandojn elvokis la prelego de Eŭgeno Kovtonjuk, kiu atestis pri la milito en Ukrainio, ĉar li venis al la kongreso de Kijivo, kaj tio, kio okazas nun en Ukrainio, estas liaj personaj spertoj kaj scioj.

La kultura programo estis ankaŭ alloga, kaj tie la stelo de la kongreso estis fama en Esperantujo pupteatraro kaj magiisto Christoph Frank. Li el Germanio alvenis kun valizego, en kiun eniris elefantoj, leono kiu surgrimpas la propran voston, Hugo, kiu ĉiam pretas helpi, miraklaj aĵoj por magio, eĉ la tuta scenejo por la pupteatraj prezentoj.



Parton de la scenejo Christoph devis mal-



munti, ĉar la flugkompanio ne permesis kun-
porti magnetojn, sed la spektakloj tamen es-
tis kiel magnetoj por altiri nian atenton. Spe-
ciale ilin ĝuis la tri infanoj de familio Yuval,
sed ankaŭ la plenkleskuloj admiris magion
kaj aktoradon de Christoph. Koncertoj ne
mankis dum la kongreso. Krom koncertoj de
Mikaelo Bronŝtejn, kiu venis de Rusio, belaj
kantoj de Natalia
Bertse el Svedio,
kortuŝa koncerto
de ukrainianoj Mikaleo Lineckij kaj Tet-
jana Kolomic kun Natalia Berce, ni
aŭskultis ankaŭ la lokan kantistinon En-
rica Arbib.

La kongresaj ekskursoj gvidis nin laŭ la
spuroj de Jesuo, kaj tiuj abundas apud
la Lago de Galileo. Lokoj kaj eventoj

kiujn mi aŭdis kaj sciis de la Biblio, de diversaj tekstoj kaj citaĵoj,
dank'al la ekskursoj iĝis tre konkretaj imagoj: Nazareto, Kaper-
naŭmo, la vilaĝo Kana kie akvo iĝis vino, la vilaĝo Magdala kie loĝis
Maria Magdalena, Tabgha, la loko kie okazis la miraklo pri fiŝoj kaj
pano, kaj multaj aliaj mencioj en bibliaj rakontoj nun estas ligitaj



kun konkretaj impresoj. Dum la post-
kongresa ekskurso tiuj bildoj estis ankoraŭ
pli kompletigitaj. Vere tiuj ekskursoj estas
por mi inspiro relegi la Novan Testamenton
jam kun alia imago kaj sento.

Tuj post kongreso la eksterlandanoj, gvida-
taj de Amri Wandel, havis belan vojaĝon tra
multaj intereseĝaj lokoj de Israelo kaj eĉ du
tagojn en Jordanio. Mi kredas, ke en la
memoro de ĉiuj 10 partoprenintoj (unu-
an tagon ni estis 11) estas ĉizitaj rememoroj pri
la etoso, viditaj lokoj, diversaj tempera-
turoj, modela gvidado kaj ĉarmaj aven-
turetoj. Nur vidu pri kiaj lokoj temas: mal-
longa halto en kibuco kiu kultivas daktilojn,

veturo tra la Jordana Valo al la Morta Maro kaj neforgesebla banado
tie, vizito en Jeriko (Hiŝam-palaco), plantoj, bestoj kaj akvofalo



en Ein Gedi, impona heroa historio en la fortifikaĵo de Masada kiun ni atingis per telfero, submara observejo kaj naĝado ĉe Ruĝa Maro en Eilat, antikvaj Jerusalemo kaj Jafo en Tel Avivo – ĉio tio kaj multaj survojaj momentoj gravuras en niaj koroj kaj kapoj Israelon kiel landon kun riĉa historio, nekredeble laboremaj homoj kaj strebo krei la prosperan ŝtaton.

Aparte mi devas mencii nian dutagan viziton al Jordanio, ĉar viziti Petra-n mi revis minimume 40 jarojn, kaj finfine tiu revo efektiviĝis! Mirinda loko, mirinda sento! Ankaŭ defio fari ĉirkaŭ 20km dum unu tago sub la suno, kiam granda parto de la vojo estas tra la ŝtuparo supren-malsupren, ne malalta prezo de la vizito... sed vere valoris efektiviĝi tiun revon! Amuza fakto estas, ke en nia grupo estis germana paro Hariolf Traub kaj Petra Sedlmeier, kaj sian nomon Petra ŝuldas al ruĝkolora, impona Petra de la nabatea popolo. Ŝia patro iam estis tiel impresita de vizito tie, ke li nomis sian filinon Petra. Nepre vizitinda angulo de nia bunta planedo, kaj des pli vizitinda kun verda Esperanto flago, ĉar kaj en Petra kaj en aliaj lokoj ofte homoj interesiĝis, kiun lingvon ni parolas kaj kiun landon ni reprezentas. Mi neniam estis en esperanta aranĝo, kie la flago tiom fidele estis portata ĉiam kaj ĉien, eĉ dum nokta promeno en Jerusalemo ni kvinope portis la flagon kaj devis klarigi al junuloj kiujn ni renkontis, kio estas Esperanto.

Kaj la ĉerizeto sur la torto, kompreneble, estis la vizito al valo Wadi Rum! Dum multaj jaroj mi legis la raportojn de israelaj kongresoj kaj postkongresoj, vidis multajn fotojn de esperantistoj sur rokoj kaj kameloj, do kvazaŭ jam imagis kiom interesa loko estas tiu valo, sed... ne eblas vere imagi sen vizito tra tiu mirinda mondo: koloroj, pejzaĝoj, etoso, veturo per ĵipoj kun vento tra la dezerto, silento matene, ĉielo nokte, manĝo elfosita el forno en la terno, muziko vespere, afabla rideto de beduenoj, kaj eĉ kelkaj Esperanto-frazoj de la posedanto de nia kampadejo, Salim, – ĉio tio ŝajnis tro bela kaj tro ĉarma por vere esti realo. La loko estas absolute mirakla, kaj tion pruvis eĉ vera fakto: nia kara fotisto Eŭgeno, kiu ĉiam kapablis trakuri kaj tragrimpi multoble pli ol ni, glitante sur dorso de altega duno, perdis sian telefonon. Imagu, kiom malfeliĉaj ni ĉiuj estis, ĉar li fotis multege kaj de interesaj anguloj, ofte de supre... Tamen Christoph eble iom magiis, Eŭgeno multe bonŝancis, kaj ili retrovis rapide la aparateton en la sabla dunego!

Kia ĝojo por ĉiuj! Mi vere suspektas, ke nia magiisto Christoph kapablas pli ol li demonstras dum la spektakloj, ĉar en la hotelo en Eilat li kvazaŭ hazarde sugestis uzi la liberan minuton por registri gratulmesaĝon por la naskiĝtago de sia edzino, kaj la rezulto estis, ke la administrantino de la hotelo,



impresita de nia komuna kantado, oferis picojn kaj ĉampanon por la vespermanĝo! Amuzaj kaj ne kutimaj momentoj estis kelkfoje dum la postkongreso: banado en la Morta Maro por ni ĉiuj lasis fortan impreson, kelkaj eĉ iris tien bani ankaŭ nokte. Aventura estis grimpadado nudpiede sur la rokoj de Wadi Rum, bele estis kuri man-en-mane de la duno ankaŭ en Wadi Rum, sed speciale interese estis, kiam en Jerusalemo ĉe la tombo de Davido virinoj aŭdis ekscititajn voĉojn ĉe la vira flanko, kaj niaj viroj ne rapidis reaperi. Kiam ili venis, ni vidis, ke Paulo Meliz de Hispanio, estas “ornamita” kiel judo per speciala skatoleto sur la kapo, rimeno volvita ĉirkaŭ la brako, kaj ĝojplena juda helpanto de la rabeno preskaŭ dancis ĉirkaŭ li pro la ekscito. La helpanto de la rabeno pro la aspekto de Paulo suspektis lin esti judo, kaj vere, la patrino kaj la avino de Paulo estis juddevenaj, do la rabeno permesis specialan ceremonion, kiu bonvenigis Paulon reen al juda popolo. Li mem ridis, ke li restis la sama Paulo kia li eniris la tombon, kaj ke por vere iĝi judo estas multe pli longa kaj komplika vojo!

Antaŭ mia foriro al kongreso multaj amikoj, konatoj kaj familianoj, eĉ la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj provis konvinki min, ke ne valoras iri al Israelo pro ebla danĝero. Mi ja plene fidis, ke Amri scias, kien kaj kiam iri, kaj mi ne eraris: eĉ ne unu sekundon mi eksentis iun danĝeron aŭ minacon. Vidi multajn junajn soldatojn kun armiloj, policon en lokoj kie amasiĝis homoj – estis trankviliga sento, ke ni estas sekuraj. Vere, la proverbo, ke timo havas grandajn okulojn, estas vero. Kaj se iuj pripensas iri al Israela Kongreso estonte, forgesu la timon.

Ha jes... la prezo! Ne malalta se enkalkuli ĉion, sed konsiderante kiom da ni vidis, kiom komforte vojaĝis per luitaj aŭtoj kaj taksioj, kiel ĝuis kunestadon - neniu el ni bedaŭras la decidon veni kaj sperti tiun interesan kaj vere diverskoloran landon, iom ekkoni Jordanion, kaj akiri novajn karajn amikojn en Esperantujo! Dankon al ĉiuj, kaj speciale al nia ĉefmotoro, Amri!

Harmonia (post)kongreso en Israelo kaj Jordanio

Amri WANDEL (*El Revuo Esperanto*, Junio 2023)

La Israelan Kongreson (IK) kaj la kongresajn eskursojn mi organizas kaj ĉiĉeronas jam pli ol dudek jarojn. Tiu amromano komenciĝis en 2000, dum la 85-a UK en Tel-Avivo, kiam mi estis prezidanto de la LKK kaj interpretisto de la plurtaga postkongresa ekskurso tra Jordanio. La sekvan jaron israelaj E-istoj komencis organizi tutlandajn E-semajnfinojn, kaj mi respondecis pri la programo kaj ekskursoj kaj ofte ankaŭ pri la kongresejo, eksterlandaj gastoj kaj buĝeto. Preskaŭ dekomence mi klopodis inviti konatajn eksterlandajn artistojn – Kajto, Jomo, Edgar kaj Bronŝtejn jam koncertis plurfoje, ankaŭ Ĵomart kaj Nataŝa (en 2018), kaj lastjare Handzlik kaj Pilipoviĉ. Alia nekutima kunlaboranto aperis por la postkongresa ekskurso en Jordanio. Saleem Zalabiah, la posedanto de beduena kampadejo en Wadi Rum, jam de jaroj prezentas al la esperantistaj gastoj ne nur beduenstilan manĝon kaj tranoktadon, sed ankaŭ surprizan konon de kelkaj frazoj en Esperanto.

Kelkaj mejloŝtonoj de la IK: 2008 – pro konsilo de Renato Corsetti ni ŝanĝis la nomon de la evento de KIES (Komuna Israela E-semajnfino) al IK (Israela Kongreso). En 2013 la IK funkciis kiel la 7-a Azia Kongreso en Jerusalemo. En 2019 la jubilea 20-a IK okazis dum kvin tagoj kiel la Mezorianta Kunveno (paralele kun Irano) en Eilat kaj Akaba. En 2020 aliĝis rekorda nombro da eksterlandanoj, sed la pandemio haltigis ĉion dum pli ol du jaroj. Tial ĉi-jare mi despli ĝojis pro la aliĝo de pluraj el la tiamaj aliĝintoj kaj aldone pliaj proksimaj geamikoj. Preskaŭ ĉiuj 13 eksterlandaj kongresanoj ankaŭ partoprenis en la jam tradicia postkongresa ekskurso tra Israelo kaj Jordanio, tiel ĝi fariĝis la dua aŭ tria plej granda postkongreso (post tiuj de la Azia Kongreso en 2013 kaj de la Jubilea Kongreso en 2019). La ĉi-jara postkongresa grupo fariĝis plej harmonia kaj unika teamo. Jam dum la tritaga kongreso aperis speciala amika etoso, kiu plu kreskis dum la ses intensaj, foje streĉaj sed spertoplenaj tagoj de la postkongreso. Spontanee estiĝis Whatsapp-grupo nomata “Postpostpost... kongreso”, por interŝanĝi fotojn, memorojn, spertojn pri la plua restado en Israelo kaj la hejmenvojaĝo.



Pluraj postkongresanoj deziris dividi siajn spertojn kun la legantoj de Esperanto.

Skribis Eŭgeno el Ukrainio: “Ne volas mi nomi ĝin postkongreso aŭ postpostkongreso, ĉar de la 13-an de aprilo 2023 komenciĝis mia Israela Esperanto-kongreso, kaj ĝi daŭros ĝis la fino de la vivo. Pro tio ke mi por ĉiam ekamis Israelon kaj miajn gekunkongresanojn.

Ne gravas ĉu ni kunos fizike aŭ per Zoom...ŝajnas ke la IK okazis kune kun la infana kongreseto, ĉar tiuj du ĉarmaj infanoj ĝuis same kiel seriozaj adoltoj la miraklan pupvicon en la magiaj manoj de la majstro Kristofo... La postkongresa vojaĝo okazis brile de ĉiuj vidpunktoj. Belega nekutima naturo, interesaj historiaĵoj, grupa komuna etoso de amikeco kaj subteno, saĝa tolerema gvidado, diversspecaj aventuroj faris ĉi postkongreson unu el la plej imponaj, ankaŭ kompare kun UEA-postkongresoj.”

El alia vidpunkto prikribis la postkongreson

Christoph Frank el Germanio: “Se oni min demandus, kio plej plaĉis? - mi ne havus tujan respon- don: “Mi la unuan fojon naĝis kaj en la Morta kaj en la Ruĝa Maroj (kaj tie observis belegajn diversajn fiŝojn ĉirkaŭante koralojn), tranoktis en beduena tendo, kaj admiris



la multkolorajn rokojn de Wadi Rum, vizitis la sagacan ejon Petra

kun impona miksaĵo de diverskoloraj rokoj kaj montoj kun antaŭ miloj da jaroj home faritaj tombejoj...

Ĉu mi jam menciis, ke mi sidas en aviadilo flugante hejmen? Ju pli for de Israelo mi estas, des pli forte mi sentas la neĉeeston de la ĉarma grupo, kun kiu mi havis tiom da ĝuo...”



Unu semajnon post la reveno preskaŭ ĉiuj grupanoj renkontiĝis virtuale dum la hibrida kunveno de la Tel-Aviva klubo, por spekti fotojn kaj rakonti spertojn de la kongreso kaj la postkongreso.

(<https://eventaservo.org/e/38d44e>). Ĝi estis tiom sukcesa, ke oni tuj decidis okazigi pliajn virtualajn kunvenojn.

Pejzaĝojn oni pli facile priskribas per bildoj ol amikan etoson, sed estis pluraj specialaj momentoj, kiel la tradicia ferma forumo de la kongreso kaj la posta amika rondo kaj la spontanea postkongresa adiaŭa forumo en Jerusalemo kun personaj memor-tasoj donacitaj de israela s-anino, Ŝulamit. Multaj pliaj specialaj fotoj videblas en Facebook, ekzemple pri la kongreso en <https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10230086684141054> kaj de la postkongreso en Jordanio <https://www.facebook.com/amri.wandel/posts/10230127735487312>.



Krom fotoj, du objektoj plej memorinde akompanis la kongreson: unu estis la verda flago, pri kiu skribis Christoph: “Por ne perdiĝi, nia grupo kunhavis Esperantan flagon, kiu ne nur estis bone videbla de fora loko, sed ankaŭ vekis scivolemon de sufiĉe multaj preterirantoj. Kelkaj eĉ

alparolis nin esperantlingve”.

La dua estis la gitaro, per kiu koncertis ĉiuj artistoj: Bronŝtejn, Nataŝa, Lineckij, kaj Christoph (eĉ dum la postkongresa busvojaĝo de Tiberiado laŭ la Jordan-valo al la Morta Maro!). Fakte temas pri historia gitaro, kiun mia patrino en 1939 kunportis fuĝinte de nazia Germanio al Palestino. En la milito de 1948 ĝi estis damaĝita pro bombado al Tel-Avivo. En 1975 mi kunportis la gitaron al la IJK en Danlando, kaj nun ĝin uzas mia filino, Tali, por eŭritmia danco.



Kurte sed sincere

Eŭgeno KOVTONJUK

En la jaro 2020-a mi aĉetis flugbileton al Tel-Avivo por partopreni IK, sed partoprenis ĝin ekzakte post tri jaroj. La unuan fojon en Israelo, la unuaj impresoj pri IK. Ne multekosta hotelo, sed malnovaj kaj novaj amikoj atendis nin. Bonega situo, kaj liveritaj de israelaj esperantistoj diversaj manĝaĵoj ĉe la kiuirejo varmigis la alvenintojn dum ne tre varma vetero.

Pro diversaj obstakloj la programo okazis flekseble, kaj surprize ĝi ne difektiĝis pro tio. Pli ol 30 partoprenintoj, inter ili 13 eksterlandanoj kuniĝis per komuna lingvo, bondezira etoso, kora akcepto kaj tre interesaj kaj ĝuigaj programeroj. Mi surprize ekŝatis triopan ĉambron pro la kompanio: du talentaj kunĉambranoj, Mikaelo Bronŝtejn kaj Christof Frank. Tiberiado mem estas ege impona urbo, sed ankaŭ aliaj lokoj ĉirkaŭ ĝi, rilatantaj al la vivo de Jesuo, impresis la partoprenintojn.



Mi plezure konstatas ke la gvidanto de ĉio kaj ĉiuj, samkiel nia ekskursgvidanto, la kara Amri Wandel, havis fortan toleremon, bonajn piedojn kaj informplenan kapon.

Postkongreso, oĥ postkongreso...! Traveturinte pli ol 100 landojn mi estis surprizita pri la historiaj, religiaj kaj etnaj kruciĝoj sur la tereno de la nuna Israelo. Palestino videblis kiel paca parto de ĝi. Palestina teritorio inversis miajn antaŭajn impresojn kaj realon. Tiu ŝajnis fakte pli agrabla kaj alloga. La plej antikva urbo en la mondo, Jeriko, kaj Hiŝam palaco kun pitoreskaj kvazaŭ hieraŭ faritaj mozai-koj sub la kupolo donacita de Japanio, restos en la memoro por longa tempo.

Certe humorajn (kaj ne nur) okazintaĵojn la E-grupo ne evitis. Aparte agrable estis elfosi antikvan atestanton de tiu epoko, magiiston kiu regas tempon, spacon, kaj iom da pupoj por plezurigi la publikon. Aperinte de iu truo li nomis sin Christof, kaj tuj fariĝis amata de ĉiuj virinoj, kaj ankaŭ mia nova amiko.

Jordano, la sankta rivero pleniĝis de baptoj diverslandaj, kaj ankaŭ el Esperantujo. Daktilplenaj palmoj salutis nian E-buseton survoje, kaj fine ni gustumis ilin en la gastema vendejo ĉe du tute pacaj vilaĝoj, juda kaj araba.

Masada! Ĝi profunde emociigis min per sia heroa kaj trista historio. Impona, sovaĝa de malproksime, kaj freskigita interne - ĝi lasis min silenta por longa tempo, pensanta pri la eventoj pasintaj. Malsupreniĝinte al la Morta Maro ĉiuj tuj trovis naĝkostumojn kaj ĝuis salegan akvon.

Sekvan tagon Jordano atendis nin per siaj belaj lunsimilaj pejzaĝoj kaj ĉarmaj gastemaj personoj. La dezerta rezervejo Wadi Rum (elparolu "ŭadi ram") en Jordano impresis la postkongresanojn per sia monumenta kaj pitoreska naturo. Sablaj kaj ŝtonaj vojetoj kondukis nin al nekutimaj vidaĵoj, kaj sur la muroj ŝajnis pentraĵoj de Picasso kaj Maleviĉ. Nia verda flago ŝvebis super abismoj, al montopintoj, en la plej neatenditaj lokoj. Ĝi faris sian promocian rolon varbinte turistojn kaj lokanojn ekinteresiĝi



pri nia kara lingvo. Mi estis tiom ekscitita per Wadi Rum ke eĉ ne povas priskribi ĝin. Mi nur diru ke mi fieras pri nia forta fizike kaj mense grupo. Hazarde perdinte kaj ne hazarde trovinte tie mian telefonaparaton mi decidis iom korekti mian vivstilon. Mi amas kaj dankas vin, WADI RUM! Kelkaj grupetoj de po tri strangujoj vagantaj kun la verda

flago estis rimarkitaj en Petra, marŝantaj pli ol 20 kilometrojn kun okuloj brilaj pro miro.

Jerusalemo surprizis nin per multkolorco religia nacia kaj vesta. Ĉi tie ĉiutaga vivo daŭras en la sanktaj lokoj. Ĉi tie muslemanoĵ vendas kristanajn suvenirojn kaj posedas ŝlosilojn de ilia preĝejo. Similan admiron ni sentis vidinte la suveniron preparitan de Ŝulamit: E-tasoj kun niaj vizaĝoj.

Ne gravas ke hodiaŭ kun avaro

Mi prenas guton de l' amik' anaro.

Sed gravas ke kun mia taso

Amikas min de vi amaso!

Dankegon al Vi, kara Ŝulamit pro Via neforgesebla donaco!

En la lasta tago Tel Avivo estis rapide trarigardita, kun iom da tristito pri baldaŭa disiĝo de geamikoj. Ĝis...



La XXIII-a Kongreso de ELI

16 - 18.06. Postkongreso: 19 - 25.06.2023

**La statistiko: partoprenintoj ~ 33 esperantistoj
(~ 20 israelanoj + 13 eksterlandanoj el 7 landoj).**

ESPERANTO SAVIS ŜIN

Tsipi MANHEIM

Antaŭ la dua mondmilito, la vilaĝo Ostrowiec (=Insuleto) en suda Pollando enhavis pli ol 11,000 judojn, inter ili estis la familioj Sylberman kaj Zabner. La familioj estis observantaj judoj, kaj dum tiu epoko ili ne kuraĝigis junulinojn studi, sed nur esti patrinoj kaj dommastrinoj. Sed Maĥla Sylberman havis aliajn ideojn, kaj aŭskultante pri la ‘mirinda’ lingvo Esperanto, per kiu oni povus paroli kun homoj tra la tuta mondo, ŝi kaj ŝia amikino sekrete aliĝis al kurso kaj lernis la lingvon.

Arie Zabner, la kuzo de Maĥla, proponis geedziĝon, sed ĉar ŝi tiam flegis sian malsanan patrinon kaj ne volis forlasi ŝin, rifuzis la proponon, kaj Arie edziĝis al iu alia. Post la morto de ŝia patrino, la germanoj invadis Polandon kaj devigis la judojn aŭ labori, aŭ ili sendis ilin al la koncentrejo Treblinka. Maĥla konis la edzinon de la ĉefo de la juda polico, kaj pro tio ŝi kaj ŝia patro sin kaŝis sur la tegmento de la polica stacio, kie la policistoj metis ĉiujn aferojn kiujn ili kaptis de la judoj. Estis tie botelegoj uzantaj por vino kun korboj nun malplenaj. Do ili restis dum pli ol du semajnoj en la korboj, kaj ricevis de la ĉefo pecon da pano kaj botelon da akvo.

Poste la ĉefo fariĝis nervoza, timante ke homoj parolus pri la afero kaj la germanoj eble scius pri la kaŝantaj judoj, kaj li insistis ke ili foriru. Post la longa restado en la korboj ili apenaŭ povus stari kaj marŝi. Dum ili restis sur la tegmento, la germanoj nombris la judan popolaron, kaj ĉiuj ricevis proprajn dokumentojn, sed Maĥla kaj la patro nenion ricevis. Arie proponis helpon, kaj li sukcesis trovi dokumentojn por Maĥla, sed ne por la patro, kiu estis sendita al la koncentrejo, kaj tie li mortis.

Sed antaŭ la foriro, kiam ili staris apude, la patro diris al Arie ke li mem ne plu povus prizorgi Maĥlon, kaj petis de Arie la promeson tion fari. Kaj tion li faris, kaj kiam ili finfine troviĝis ĉe la koncentrejo Auŝvitz, li provizis ŝin per pano aŭ supo – kiu haveblis. Intertempe la edzino de Arie ne plu survivis. Kiam la milito alproksimiĝis al la fino, la germanoj fermis la koncentrejojn kaj devigis la judojn iri piede – la viroj al Mauthausen en Aŭstrio kaj la virinoj al Bergen-Belsen en Germanio.

Kiam ili preparis foriri, ili staris en vicoj, kaj ne rajtis komuniki. Arie verkis noton por ŝi, kiu deklaris sian amon, uzante frazon de la Biblio. Li kaŝis la noton en peco de pano kaj sendis ĝin al ŝi tra la vicoj. Kiam ĝi venis al Maĥla, la pecoj de pano estis jam formanĝitaj, kaj nur la noto restis. Tiam la anglaj soldatoj venis kaj liberigis ilin. Maĥla restis en hospitalo en Germanio suferante de tifo, kaj tute ne sciis kie estis Arie. Kiam ŝi saniĝis, ŝi decidis trovi lin. Tiam estis multaj kampoj da homoj sen parencoj, sen vivlokoj, kiuj vagis de unu loko al alia. Troviĝis lokoj kie homoj metis notojn ke ili ankoraŭ vivas aŭ ke ili serĉas parencojn aŭ amikojn. Do Maĥla vagis de unu loko al alia, uzante Esperanton komuniki kun diversaj homoj survoje. Dum kvar monatoj ŝi tiel vagis, kaj eventuale venis al Italio. Tie ŝi povis per Esperanto kompreni la italajn soldatojn, kiuj helpis ŝin en ŝiaj klopodoj. En iu vilaĝo proksime al Torino, ŝi renkontis junulon kiu venis de la sama vilaĝo en Polando. Li diris al ŝi: "Ne foriru de ĉi tie. Mi scias, kie estas Arie, kaj mi venigos lin al vi". Tion li faris, kaj finfine Maĥla kaj Arie estis kune. Ili iris al Torino, kie Arie atendis ŝipon al Israelo. Ili volis geedziĝi tuj, kaj iris al la ĉefrabeno.

La rabeno informis ilin, ke ĝuste tiam oni aranĝas edziĝfeston por itala virino kaj angla soldato, kaj la rabeno diris al tiu paro, ke estis du enmigrintoj el Polando kiuj volis geedziĝi, kaj petis lokon por ili dum la gedziĝo. Ili konsentis, kaj Maĥla kaj Arie festis sian unuigon en granda festo. La homoj kuraĝigis ilin kaj ĵetis liliojn sur ilin.

Ili tie atendis ŝipon kiu portis ilin al Israelo, kaj tie ili formis familion - kiu fakte estis savita per Esperanto.

Traduko de Yehuda Miklaŝ

REEĤO AL "ISRAELA ESPERANTISTO" - 173


Kara redaktoro, mi elkore dankas pro la somera numero de "Israela Esperantisto". Mi trovas ĝin interesa, belaspekta, enhavoriĉa kaj nepre leginda. Precipe min kortuŝis la ĉefa temo de la revueto, nome - Ukrainio. Mi laŭ miaj ebloj subtenas Ukrainion per vortoj kaj per mono. Ĉiu ajn milito estas abomena, kaj mi volas, ke ĝi baldaŭ finiĝu. Kun plezuro mi legas lastajn paĝojn (Literaturan Suplementon), ĉar ankaŭ mi poiomete verkas kaj tradukas. Mi volas proponi du miajn laste tradukitajn ŝercojn aldone (*vidu la pĝ 49*) Amike via, Abromas Laimundas.

NI FUNEBRAS...




D-ro Aharon Davidzon forpasis la 8-an de Julio 2022 en Ĥadera pro kor-nesufiĉeco sekve de pneŭmonio. Li naskiĝis la 15-an de septembro 1938 en Rumanio, kaj enmigrinte Israelon en 1976 li eklaboris kiel familia kuracisto (tre amata de siaj pacientoj) en la ĉefa kliniko de la Klalit-Sanservoj ĝis sia emeritiĝo. Tiam Aharon eklernis E-on kaj tuj membriĝis en ELI kaj UEA; ekde 2021 ankaŭ en ATEO. Li tiam ofte partoprenis la kunvenojn de la Tel-Aviva Klubo. Ekster la E-vivo Aharon havis multajn aliajn sferojn de intereso: ŝako (ekde la infanaĝo), astronomio, historio, filozofio, literaturo, lingvoj, muziko kaj teatro; pri ĉiuj tiuj li amis interesigi aliulojn. Kune kun sia vivkunulino Ŝulamit Tandler li transloĝiĝis antaŭ kelkaj jaroj al Ĥadera; ŝi plusekvas lian E-vivon kaj jam membras en ELI kaj UEA. Ni kondolencas ŝin kaj aliajn familianojn.

Lia Memoro estu benata.



Jinon Meiri forpasis en Kirjat-Tivon la 22-an de Decembro 2022, 79-aĝa, post malsano. Naskiĝinta en Kfar-Jehoŝua la 25-an de Septembro 1943, li denaske estis diagnozita pri kora difekto, kio influis lian tutan vivon. Kvankam la difekto estis riparita kiam li estis 20-jara (li estis inter la unuaj apertkoraj operaciitoj en Israelo), al li estis malpermesita ĉia fizika aktiveco, kaj li estis liberigita de la armea servo. Aliflanke la cerba agado iĝis lia konstanta okupo, ekde la studado de kemia inĝenierado ĉe la Tehnion ĝis la E-kurso en 1965 ĉe Leo Ringle, kio malfermis por li aktivecon en socia medio, ĝis tiam ne aparte spertata ĉe li. Tuj post la E-kurso li aliĝis al ELI kaj al UEA (ekde 1971 ankaŭ al la ĵus fondita JELI). Ekde 1971 li iĝis FD pri naturprotektado kaj ekde 2001 ankaŭ Delegito por Kirjat-Tivon; en 2011 fariĝis Dumviva Membro de UEA. Post sia koroperacio Jinon ofte partoprenis, piede kaj aŭte, la ekskursojn de Societo pri Naturprotektado kaj ankaŭ E-ekskursojn, en kiuj li mirigis nin per sia profunda kono de flaŭro kaj faŭno (li koniĝis al ni la hirakon!); por multaj el la Nordanoj li estis ankaŭ “persona ŝoforo” veturiganta ilin al la kunvenoj. Plurfoje li partoprenis UK-ojn, de Eŭropo ĝis Brazilo, laste en Nitra, kie li ricevis diplomon pro 50-jara movadeco. Kelkajn jarojn antaŭ sia pensiĝo li studis komputilprogramadon, pri kiu li laboris ĉe la “Israelaj Fervoj”. Dum siaj liberaj vesperoj li amis publike kantadi en la loka ĥoro. **Estu benata Lia Memoro!**



Abraham (Rami) Šlain forpasis en Givatajim la 2-an de Januaro 2023 en la aĝo de preskaŭ 86, post malsano. Naskiĝinta la 1937-01-19 en Tel-Aviv, dotita per pluraj talentoj, li iĝis arkitekto, artisto kaj volontulo, amanto de naturo kaj homoj. Dum sia deviga armea servo, li konatiĝis kun la radio, kaj post la fino de siaj arkitekturaj studoj en Technion, li lernis kaj pasis la ekzamenojn pri radioamatorismo; tuj li ekaktivis en la Societo de Radio-Amatoroj de Israelo kaj en ĝiaj instancoj, partoprenis ĝiajn agadojn kaj renkontiĝojn kaj havis ampleksajn kaj regulajn radio-kontaktojn ĉirkaŭ la mondo dum jardekoj. Li lernis E-on ĉe d-ro Maschler en 1970 kaj tuj ekhavis multegajn kontaktojn kun radioamatoroj-esperantistoj tra la mondo. Aliĝinte al UEA en 1982, li fariĝis ekde 1985 la Delegito por Givatajim kaj ĝis 2008 ankaŭ FD pri sia ĉefa hobbio. Li partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn (i.a. respondecis pri la arta programo en la Tel-Aviva UK de la jaro 2000) kaj aktivis en la E-Klubo de Tel-Aviv.

Estu benata Lia Memoro!

Joela Egozi

Kun granda malĝojo ELI informas pri la forpaso de nia kara s-anino, Joela Egozi, kiu forpasis la 9.1.2023-an, post koroperacio. Ŝi ordonis ke ŝia korpo estu kremaciita, pro tio ne ekzistas tombo. Ŝia forpaso estis menciita en la Israela Kongreso en aprilo. Joela estis afabla virino, bona patrino kaj avino al siaj filinoj kaj nepoj, kaj bona amikino. Ŝi ĉiam zorgis ne nur pri siaj familianoj kaj amikoj, sed kiel parto de sia laboro dum jaroj ĉe Nacia Asekuro, kaj poste multjare kiel volontulo, ankaŭ pri la cetera mondo, ne nur pri si mem. Ŝi estis saĝa virino, tre organizita, ĉiam bone prizorgita kaj bone informita pri preskaŭ iu ajn temo.



Kadre de sia membreco en la Tel-Aviva Esperanto-Klubo, ĝis antaŭ proksimume kvar jaroj, ŝi studis Esperanton, kaj eĉ korespondis dum jaroj en Esperanto kun homoj el pluraj landoj, ĉefe el Japanio. Kune kun Lea, Joela dum multaj jaroj prizorgis la regalon kaj la ornamadon de la salono por la duonjaraj Landaj Kunvenoj de ELI, klopodante ke la evento estu digna kaj agrabla. **Estu Ŝia Memoro benata!** (*kompilita de Miĥal Amir*)



Judith Epštein forpasis en Tel-Aviv la 16-an de Marto 2023 (ŝia kadavro estis malkovrita nur kelkajn tagojn post ŝia aktiva partopreno en zoma kunveno de Klubo "Josi Ŝemer"). Ŝi naskiĝis la 1941-08-08 en Tel-Aviv, kaj lerninte E-on komence de la 70-aj jaroj, ŝi tuj ekmembreis en JELI, ELI kaj UEA kaj partoprenis la kunvenojn de JELI kaj de la Tel-Aviva Klubo. Profesie grafikistino kaj pentristino ŝi malavare donacis al ni per sia talento, i.a. produktante por ELI ties oficialan paperon (vidu belegan kolekton de ŝiaj verkoj ĉe <<https://www.flickr.com/photos/36344678@No8/>>). **Estu benata Ŝia Memoro!**

KOĈJO

En unu el la lernejoj kun ruslingva instruado en okcident-ukrainia urbo Lviv lernis knabeto, aparteninta al baza nacieco de Ukrainio. Li havis nomon (estu tiel) Nikolao (Koĉjo) Petrenko.

Pro tio, ke en la lernejo lernis ne nur ukrainoj, ŝatataj sloganoj de la junpioniro ankaŭ en la posta socia formiĝo, estis: “Ni batu judaĉojn” kaj “judaĉoj, for en vian Israelon!”

La lernantoj, kiuj apartenis al la nebaza nacia tavolo, fojfoje batis Koĉjon, sed pli poste ili decidis, ke, fakte, li pravis. Kaj fine de la maltrankvilaj 80-aj jaroj de la XX-a jarcento ili poiom ekmoviĝis en la indikitan de Koĉjo direkton. Mi opinias, ke tiam multaj, eble eĉ ĉiuj semitoj havis apude sian antisemiton.

Pasis proksimume 20 jaroj, kaj foje mian amikon, loĝantan en Jerusalemo, strate iu alvokis. Turninte la kapon li ekvidis ortodoksan, nigre vestitan judon kun ĉapelo kaj kun flankharbukloj – kutima religiulo, da kiuj multas kaj en Jerusalemo kaj en Bnej Brak, ankaŭ en Brooklyn. Kaj kio evidentiĝis – antaŭ mia amiko staris Nikolao Petrenko.

Post fino de la lernado, verŝajne pro akra malamo al judoj, li edziĝis al judino. Post paso de ioma tempo ili elmigris al la Sankta Tero. Tie Koĉjo plonĝis en la religion - li komencis studi Toraon, faris religian konvertiĝon, kaj ricevis novan nomon, la hebrean, pri kiu mi sekretas en mia rakonto. En la interparolo li diris, ke Tora malfermis por li la veron, ke li estas feliĉa, ke li kvazaŭ trovis sin, ktp.

Nu, kion neordinaran vi vidas en tiu rakonto, vi povas demandi min? Ni ja scias kaj legis pri miloj da tiaj homoj. Ĉu vi ankoraŭ memoras, kiumaniere li alvenis al Israelo? Jes, li edziĝis al judino. Sed jen – li divorcis!!! Vin interesas la kaŭzo? Ĉu vi firme sidas aŭ staras?

Koĉjo ne povis pardoni al ŝi, tion, ke ŝi edziniĝis al ne-judo!

&&&

- Mi scias ĉion – fiere diris Vikipedio...
- Mi helpas trovi ĉion! – reeĥe diris Guglo...
- Mi estas ĉefa en la mondo! – rebate diris Interreto...
- Nu – nu... - mallaŭte kaj modeste diris Elektro...

KIO ESTAS POLITIKO?

Nu jen, por rusiaj judoj oni permesis elmigri en Israelon. En Moskva Flughaveno la doganisto trovis en ia bagaĝo statueton de Lenin*, kaj demandis la posedanton:

- Kio estas tio?

La viro respondis:

- Kio estas tio? Nekorekta estas la demando, kamarado**... "Kiu estas tiu?" Tio estas kamarado Lenin. Li kreis fundamenton de socialismo. Mi kunprenas lin kiel memoraĵon pri nia heroeca pasinto... Rusia doganisto, iom pripensinte, permesis al li pluri sen plua kontrolo.

En Flughaveno de Tel-Avivo israela doganisto same demandis nian repatrianton:

- Kio estas tio?

La respondo estis jena:

- Kio estas tio? Nekorekta estas la demando, sinjoro. Vi devus demandi min: "Kiu estas tiu?" Tiu estas Lenin – grandega aĉulo, kiu devigis min, judon, forlasi Rusion. Mi kunprenis tiun statueton, por ke mi povu ĉiutage malbeni lin.

La oficiro de israela doganejo tuj diris:

- Mi permesas al vi iri pluen.

Veninte en Israelon, en sian novan domon, li metis la statueton sur la tablon. Li invitis siajn amikojn kaj parencojn por la tagmanĝo.

Unu el la gastoj demandis lin:

- Kiu estas li?

La respondo estis jena:

- Kara mia amiko, "Kiu estas li?" estas neĝusta demando. Vi devus demandi min: "Kio estas tio?" Tio estas tri kilogramoj da pura oro, kiujn mi sukcesis alporti ĉi tien, sen pagi la doganan kaj ŝtatan impostojn.

La moralo:

"Politiko estas scipovo prezenti la saman aĵon per diversaj manieroj, por ke tio estu konvinkiga por la respektivaj aŭskultantoj."

Speciale por juna generacio:

* Lenin - unu el fondintoj de Soveta Unio.

** kamarado - kutima interhoma sinturno en Soveta Unio, kiu tute ne estas ligita kun ajnaj kamaradecaj sentoj...



ŜERCOJ, DISTRAĴOJ, LITERATURAĴOJ

*Ŝercoj, tradukitaj de nia leganto el Litovio
Abromas Laimundas.*

En la trajno, en la sama kupeo vojaĝas negro kaj judo.

- Aŭskultu, - diras la judo, - ĉu vi eble estas judo?

- Ne, mi estas negro.

- Aha, sed tamen eble via panjo aŭ via paĉjo estis judoj?

- Mi estas negro.

- Senkaŭze vi sinĝenas pro mi. Tamen, ĉiuokaze, eble en via parenca-
ro estas juda sango?

- Mi estas negro.

La judo, ne atentante la respondojn, demandadas simile plu, ĝis kiam
la negro, perdinta paciencon, ekkrias:

- Jes, jes, mi estas judo !!!

- Aŭskultu, sed pro kio vi tiel similas negron?

En la trajno la pasaĝeroj interparolas pri famaj homoj. En la inter-
parolo partoprenas judoj, kiuj ĉiam trovas „siajn“ samnacionojn.

- Einŝtejn...

- Judo.

- Spinozo...

- Judo.

- Levitano...

- Judo.

- Zamenhofo...

- Judo.

- Ho, Sinjoro Jesuo Kristo! – ne eltenis iu el la apude sidintaj najbar-
oj.

- Ankaŭ li estis judo...

FAMILIO...

Kibucano Ŝlomo fariĝis 60-jara, kaj li decidis viziti kuraciston por ple-na medicina esploro. Kiam ĉio estis finita, la kuracisto diris:

- Malstreĉiĝu, Ŝlomĉjo, vi havas tre bonan sanstaton. Mi trovis neni-on malbonan. Plej verŝajne, vi vivos ĝis 120 jaroj. Diru al mi, kiom da jaroj havis via patro, kiam li mortis?

- Ĉu mi diris al vi, ke mia patro mortis?

- Ho, kiom da jaroj havas via patro? Ĉu li ankoraŭ aktivas?

- Li havas 83 jarojn, trifoje semajne li kuradas kaj okupiĝas pri is-raelaj dancoj.

La kuracisto estis tre mirigita kaj demandis plu:

- Kiom da jaroj havis via avo, kiam li mortis?

- Ĉu mi diris al vi, ke mia avo mortis?

- Do, vi volas diri al mi, ke vi havas 60 jarojn, via patro - 83, kaj la avo estas vivanta? Pri kio okupiĝas via avo?

- Li dufoje semajne vizitas naĝbasenon, ĉiudimanĉe golfludas, se la vetero estas konvena. Li havas 107 jarojn, kaj la sekvan semajnon li denove edziĝas.

La kuracisto demandas:

- Se li havas 107 jarojn, kiucele via avo volas edziĝi?

Ŝlomĉjo atente rigardis en la okulojn de la kuracisto, kaj diris:

- Ĉu mi diris al vi, ke li volas? Li estis devigita!!!

&&&

INERCIE ANKORAŬ KELKAJ JUDAJ ŜERCOJ

- Abramĉjo, kiel statas via vivo?

- Nu, kiel diri al vi - kiel sur la ŝipo: horizonto estas vasta, perspektivo estas nebula, fuĝi ne eblas, iom naŭzige, sed la navigado daŭras...

&&&

- Mi jam atingis tiun aĝon, kiam rigardante rekte al okuloj de panjo, mi povas diri: La supon mi ne manĝos!

&&&

Prefere esti bona homo kiu blasfemas, ol kvieta kaj bonedukita aĉulo.

&&&

- Isaak, mi gratulas vin! Tuj videblas, ke vi edziĝis - via ĉemizo estas senriproĉe gladita!

- Ho jes, tio estas la unua, kion instruis al mi mia edzino...

TRE INTERESE PRI MONA LISA

Se iu provus vidi la pentraĵon Mona Lisa de tre proksima distanco, por ke ŝia okulo okupu tutan ekranospacon... Aŭ la lipoj... Vi konsterniĝus pro la perplekso... Ĉar ne eblas vidi eĉ unu peniktuŝon. Eĉ la plej-plej etan. Eblas grandigi la pentraĵon senlime. Vi neniel vidos ilin. Eĉ se vi uzus mikroskopon. Eĉ plie, kiam la esploristoj faris rentgen-foton de la bildo, ankaŭ ili trovis eĉ ne unu peniktuŝon.

Sed estis trovita io tute neimagebla! 30 plej delikataj tavoloj da farbo. Vi eĉ ne povas imagi kiom maldikaj. Je unu mikrometro. Por la komparo – diametro de homa haro estas 80 mikrometroj! Evidentiĝis, ke la peniktuŝoj tamen estis, sed ĉiu tuŝo longis unu kvardek-onon de milimetro. Leonardo helpe de lupeo faris reton da tiaj mikro-streketoj per la peniko, kaj post tio li metis tavolon de plej delikata farbo. Kaj ti-umaniere 30-foje: tavolo da streketoj,



tavolo da farbo. Tiel rezultiĝis la pentro-sorĉaĵo. Plej mildaj transiroj de unu koloro al la alia. Aperas imago, ke la virinon vualas aero... Plej delikataj ombretoj. Ĝuste pro tio venas enigmeco de Mona Lisa. Ne vane ŝajnas al ni, ke ŝi tuj ekparolos, tuj ekspiros. “Sfumato” – ĝuste tio estas “viveca akvo” de Leonardo. Li faris ĉion por ke ŝi ŝajnu viveca. Se pentristo uzas sfumaton, tio signifas, ke vi ne ekvidos distingeblajn liniojn kaj difinitajn ŝanĝojn de unu koloro al la alia.. Eĉ male, unu koloro milde ŝanĝiĝas per la alia. Kaj aperas iluzio pri apenaŭ rimarkebla vualeco inter la spektantoj kaj la pentraĵo. La itala vorto “sfumato” estas tradukata kiel “vualeca fumeto”.

NDLR. Mi certas, ke la legantoj tuj komprenis sencon de la vorto...

*La teksto estas prenita de Interreto.
Tradukis de la rusa – M.Lineckij*

KIAL HUNDOJ VIVAS MALPLI OL HOMOJ

Mi, kiel veterinaro, estis invitita por ekzameni 13-jaran hundon, kies nomo estis Batuta. La familio atendis miraklon. Mi observis la hundon, kaj komprenis, ke ĝi estas mortanta. Mi povis fari nenion. Batuta-n ĉirkaŭis tuta familio. Knabeto, filo de majstroj de la hundo, ŝajnis esti tre trankvila, adiaŭe brakumante la hundon. Mi enpensiĝis, ĉu la knabeto komprenas, kio okazas? Post kelkaj momentoj la hundo trankvile ekdormis por ne plu vekigi. La knabeto ŝajne perceptis tion senprobleme.

Mi aŭdis, ke la patrino demandis:

- Kial vivo de hundoj estas malpli longa ol tiu de la homa?

Kaj la knabo neatendite donis la respondon:

- Mi scias kial...

Liaj vortoj ŝanĝis mian vivkoncepton. Li diris:

- Homoj venas en la mondon por longe lerni vivi bone, ĉiam ami la aliulojn kaj esti bona homo. Kaj la hundoj naskiĝas jam tiaj, scipovante ĉi ĉion, ili ne bezonas vivi tiel longe kiel ni.



Moralo de la historio.

Se hundo estus nia instruisto, ni ekscius pri:

- Kiam la hejmanoj revenas hejmen, ĉiam kuru renkonti ilin.
- Neniam evitu eblon iri promeneti.
- Permesu al vi eksenti freŝigan aeron kaj venton al la vizaĝo.
- Ĉiam kaptu la okazon dormeti.
- Bone etendu la korpon antaŭ la ellitiĝo.
- Ne mordu, se estas eblo nur graŭli.
- Kiam estas tre varme, trinku multe da akvo, kaŝu vin en ombron de granda arbo.

- Kiam vi estas feliĉa, ne kaŝu tion.
- Ĝuu pro simplaj pretekstoj.
- Estu fidela.
- Nenian ŝajnigu vin tia, kia vi ne estas.
- Se tio, kion vi tre bezonas, troviĝas ie profunde, serĉu, serĉadu obstine.
- Kaj neniam forgesu: kiam via proksimulo havas malbonan tagon, sidu apude silente, sed faru tiel, ke li sentu, ke vi apudas!

La teksto estas prenita el Interreto, la aŭtoro estas nekonata,

tradukita de M.Lineckij

IOM DA REGULOJ POR OPTIMISTOJ

Ne forgesu forĵetadi fatrason... el la sitelo...el la kapo... el la vivo!

Se la eraron eblas korekti, tio signifas, ke vi ankoraŭ ne eraris.

La plej bona instruisto en la vivo estas sperto. Malgraŭ tio, ke ĝi kostas multe, sed klarigas ĉion tre bone.

Dankon al tiuj homoj, kiuj eniris mian vivon kaj faris ĝin superba.

Dankon ankaŭ al tiuj homoj, kiuj forlasis ĝin, farinte ĝin ankoraŭ pli bona.

Ĉiam estas iu, al kiu ne plaĉas tio, kion vi faras. Tio estas normale.

Al ĉiuj senescepte plaĉas nur katidoj.

Se iu riproĉas vin, koleras aŭ ofendiĝas – premu lin per via pozitiveco.

Mi ne volas ĉagrenigi vin, sed ĉe mi ĉio bonordas.

Recepto por ĉiam esti juna: ĝoju pri ĉiu bagatelo, kaj ne nervumu pro ĉiu fiulo.

La plej bona tago - la hodiaŭa

Estas du tagoj en la jaro, kiam vi ne povas finfari ion ajn: unu estas hieraŭ, la dua estas morgaŭ.



HMMM....

Mi en la aĝo 37 jaroj ĉiumatene kuras 10 km-n, laboras 14 horojn diurne, gvidas 3 firmaojn, verkas 2 librojn. Kaj malgraŭ ĉio mi havas tempon por la familio, por la amikoj, kaj eĉ por kanti en amatora ĥoro. Vi vidu – ĉio tio vere eblas, kiam homo scipovas bone mensogi...

- Bonan tagon, sinjoro kuracisto!
- Ĉu ni estas konatoj?
- Jes! Ja vi min iam kuracis...
- Pardonu, mi ne memoras.
- Nu, tio estis antaŭ 20 jaroj...
- ... 20 jaroj...
- Vi tiam al mi diris, ke mi vivos ankoraŭ ne pli ol 2 monatojn.
- Ĉu? ...Eble... Verŝajne mi nesufiĉe bone vin kuracis...

NOKTAJ TIMOJ

Ekde tiu tempo, kiam mi estis ankoraŭ infano, mi ĉiam timis iun, kiu probable estis sub mia lito.

Tial mi decidis viziti psikologon s-ron Ŝvarc, kaj mi diris al li:

- Mi havas problemon. Ĉiufoje, kiam mi enlitiĝas, al mi ŝajnas, ke iu estas sub la lito. Mi timas. Al mi ŝajnas, ke mi jam poiome freneziĝas.
- Vi simple konfidu vin al mi por unu jaro, kaj fine ĉio bonordos - diris la psikiatro. – Venu por paroli kun mi trifoje semajne, kaj mi liberigos vin de tiu timo.


- Kiom tio kostas?
- Cent kvindek dolarojn por unu vizito, - respondis la kuracisto.
- Mi devas pripensi...

Post duonjaro mi hazarde strate renkontis la psikiatron.

- Kial vi ne vizitas min pri via timo, kiu turmentis vin? - demandis li.
- Nu, 150 dolaroj por la vizito trifoje semajne dumjare, tio estas 23 400 dolaroj. La ĉefo, ĉe kiu mi laboras, sanigis min kontraŭ 10 \$. Mi estis tiel feliĉa pro la ŝparita mono, ke vizitinte aŭtovendejon mi aĉetis novan aŭton.
- Kaj, permesu vin demandi, kiumaniere la ĉefo kuracis vin? – iom ironie demandis la kuracisto.
- Li konsilis al mi forsegi “piedojn” de la lito. Do, nun tie praktike simple mankas loko por iu ajn.

La moralo: ĉiam penu ekscii la alternan varianton.

DISTRAĴOJ POR LA CERBO

<p>TASKO POR ATENTEMULOJ Kiom da ŝtuparoj necesas uzi por preni de sur la tegmento la sekigintajn tolaĵojn?</p>	<p>TASKO POR TIUJ, KIUJ ANKORAŬ NE FORGESIS ARITMETIKON. Do, kiom?</p>
	<div style="display: flex; align-items: center; margin-bottom: 10px;"> + = 30 </div> <div style="display: flex; align-items: center; margin-bottom: 10px;"> + = 20 </div> <div style="display: flex; align-items: center; margin-bottom: 10px;"> + = 8 </div> <div style="display: flex; align-items: center;"> + × = ? </div>

KELKAJ ŜERCAJ PORINFANAJ ENIGMOJ (la adoltoj, antaŭ ol legi la solvon per lupeo - pensu iomete)

1. Tri ursoj ekanabiozis. La unua - la 24.12, la dua la 29.12 kaj la tria - la 2.01. Demando: kiam ĉiu el ili vekigōs? La solvo: printempo

2. Homo saltis el aviadilo sen paraŝuto. Li trafis al dura tero, sed restis vivanta kaj sendifekta. Kial? La solvo: La aviadilo estis surtere

3. Aŭto veturas je 100 km/h. En la kofrujo estas kanono, kiu pafas per pilkoj malantaŭen per rapideco 100 km/h. Kio okazos al pilko, kiam ĝi estos pafita? La solvo: Ĝi ne flugos, ĝi falos.

4. En fridujo estas tri boteloj da suko: poma, oranĝa kaj tomata. Se vi tre volas trinki, kiun vi malfermos unue? La solvo: fridujon

5. Kion ne eblas enmeti eĉ en la plej grandan kaserolon? La solvo: Gian kovrilon

MOZAIKO PRI LA ISRAELA KONGRESO 2023



13 - 21.04.2023